

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 14

Novembro 1937

Eldonanto :
Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth
(Herts.), Anglujo.

Redaktoro : Teo JUNG
223. Harstenhoekweg
Scheveningen
Nederlando.

Esperanto oficiala helplingvo de la 34-a Eŭkaristio Mondkongreso

Jam plurfoje ni pritraktadis la demandon de universalaj mondkongresoj. Ni ne ĉesis akcenti, ke Esperanto taŭgas plejbone en ĉiuj mondkongresaj kunvenoj. « Heroldo de Esperanto » eĉ plurfoje pritraktis la demandon de la enkonduko de nia lingvo en la venontan Eŭkarian Mondkongreson en Budapeŝto. Nun fine ni povas raportoj pri la plej sukcesa venko de nia movado: *oni oficiale enkondukis Esperanton en la 34-an Eŭkarian Mondkongreson.*

Sed la vojo al tiu venko estis vere dornoplana, malglata! Certe ĝi estas tre instrua por la propagando de nia movado, tial estu permesate al mi rakonti kiel oni atingis tiun plej gravan sukceson.

Jam de l' komenco ni tre bone sciis kiom grava malhelpo estos la komunikado en la Mondkongreso pro la diverspeco de la lingvoj. La prepara komitato de la 34-a Eŭkarian Mondkongreso eĉ minuton ne dubis pri tio, kaj klopodis kunigi ĉiujn fremdlingve parolantajn anojn por la prepara kaj organiza laborado. La Hungara Katolika Esperanto-Societo (HKES) jam frue eklaboris en la intereso de nia lingvo. Oni aranĝis novajn kursojn, kaj oni propagandis ĉie. Eĉ oficialan paŝon ni faris ĉe la prepara komitato de la Eŭkarian Kongreso, kaj nia afero ŝajnis esti sur la plej bona vojo.

Tiam subite neklarigebla malvarmiĝo eksentiĝis, intervenis iu malluma influo, kaj la prepara komitato ĉion rifuzis. Tiel stasis la aferoj jam en julio, kaj la XI-a Esperanta Landa Kongreso en Ujpest je 21-22 aŭgusto povis decidi nur tion, ke malgraŭ ĉiu malhelpo ĉiuj esperantistoj,

sen religia distingo, kunlaboru okaze de la Eŭkarian Kongreso por gvidi niajn gesamideanajn gastojn.

Sed intervenis iu malgranda, ŝajne sensignifa akcidento. Legante en « Heroldo de Esperanto » la artikolojn pri la lingva demando de la Eŭkarian Kongreso, nia kara kaj ŝatata samideano : *Dom Wilfrid Broens, O.S.B.*, delegito de IEL en insulo *Trinidad* (British West Indies), tuj skribis leteron al la prepara komitato de 34-a Eŭkarian Kongreso, kaj tiu letero havis plejgrandan efikon. Jen la teksto de la letero:

La fakto, ke la XXXIVa Kongreso Eŭkarian okazos en Budapeŝto, la granda ĉefurbo de Hungarujo, pensigas multajn esperantistojn katolikajn, kiel oni ricevos la multegajn gastojn el diversaj landoj en Budapeŝto. Via hungara lingvo estas bela en si mem, sed tre malfacile lernebla por fremduloj, ĉar via lingvo ne havas ion komunan kun aliaj lingvoj. Oni spertis la malfacilecon dum la Skolta Mond-Jamboreo.

Estas konate, ke la germana lingvo estas parolata grandparte, kiel fremda lingvo en Hungarujo, sed ankaŭ ĉi tiu lingvo estas ankaŭ tre malfacila por fremduloj, kaj krom tio multaj personoj ne plu ŝatas uzi la germanan lingvon. La franca kaj la angla lingvoj ne estas sufiĉe disvastigitaj en Hungarujo. La latinan lingvon oni povas uzi por ekleziaj aferoj, sed ĝenerale la laikuloj ne komprenas ĝin.

Kia lingvo estus plej aplikebla en Hungarujo dum la Eŭkarian Kongreso? Ĉu ne estus inda al via fame ĝentila kaj gastama nacio, se vi permesus, ke ankaŭ la lingvo Esperanto estas oficiala lingvo dum la kongreso? Tio prezentus okazon al tre multaj por senĝena kaj senpera interrilato. Estas multaj esperantistoj katolikaj en la mondo, kaj ankaŭ en Budapeŝto.

Ĉu ne estus bone instigi la kongresanojn lerni Esperanton per viaj diversaj propagandiloj? La sukceso povos esti surpriza.

Via en Kristo,
Dom Wilfried Broens, O.S.B.

La prepara komitato, ricevinte la leteron, ne sciis en kiu lingvo ĝi estis skribita. Oni pensis, ke eble en hispana, sed la hispana tradukanto ne komprenis ĝin. Eble en Esperanto, oni pensis, kaj tuj sendis ĝin al mi, ke mi, kiel ano de la prepara komitato, traduku ĝin. La demando kaj propono de nia kara samideano pripensis serioze la preparan komitaton. Ni komencis denove pritrakti la demandon de la enkonduko de Esperanto, kaj forigi la kontraŭstaron. La plej grava kontraŭdiro estis ke la Eŭkarian Kongreso ne povas esti propagandilo de Esperanto. Ni konvinkis ilin, ke ĝi eĉ ne volas. Esperanto volas nur *helpi al la Kongreso*, ĝi volas esti simple komunikilo, kiel pastro Broens proponis. Ankoraŭ multajn aliajn kontraŭdirojn ni rifutis, — pri ili ĉi tie ni ne parolu, — kiam finfine oni decidis ke bone; oni presigu la propagandbroŝuron esperantlingve, kaj la HKES organizu la fremdultrafikan laboron de esperantistoj.

Jen tio estis la komenco! Ni komencis traduki la propagandbroŝuron, kaj organizi niajn esperantistojn.

Sed la afero nun komencis evolui plej favore!

Venis la demando de la Universala Katolika Esperanto-Kongreso kune farenda kun la Eŭkarian Kongreso. La estraro de la HKES pensis tamen, ke ni ne kunvenigu universalan kongreson aparte por ne kontraŭiĝi tiamaniere la IKUE-kongreson, sed ni organizu la *Unuan Eŭkarian Esperanto-Mondkunvenon* en la kadro de la ĝenerala Eŭkarian Kongreso. Tiu ideo estis akceptata de la prepara komitato, kaj la prepara komitato, kaj la laboro de la preparado, kune kun ĉiuj Esperanto-demandoj de la Eŭkarian Kongreso, estis komisiita al *Oficiala Esperanto-Subkomitato*. Tiel fondiĝis la *Esperanto Prepara Subkomitato de la 34-a Eŭkarian Mondkongreso*. La devo de tiu *Subkomitato* estas nun aranĝi la Esperantan Eŭkarian kunvenon kaj fari ĉiun Esperanto-laboron de la Eŭkarian Kongreso.

Jen unufoje *Esperanto Prepara Subkomitato* en iu grandskala internacia

Hungara urbeto vekigis al Esperanto-vivo

En Kalocsa, 1500 personoj aŭskultis
paroladojn de Kola Ajayi.
400 anoncis sin por kursoj.

En la malgranda urbo Kalocsa, Hungarujo, jam delonge ekzistis nur tre malmultaj, unuopaj esperantistoj. Antaŭ la milito esperantistigis kelkaj metiistoj kaj intelektuloj, sed la mondmilito malhelpis la naturan evoluadon de la movado, kaj sen organizo ĉiu Esperanta vivo ĉesis. Nur la oficiala delegito reprezentis Esperantujon en la urbo, preskaŭ tute sola, kaj ĉiu klopodo de propagando malsukcesis.

Sed jen la granda okazintaĵo, la oficialigo de la lingvo Esperanta en la 34-a Eŭkaristia Mondkongreso en Budapeŝto, plivigligis la propagandon en la tuta lando, kaj la ideo, ke multaj esperantistoj venos venontjare en la landon, donis novan, freŝan energion kaj interesiĝon al ĉiuj. Sed krom la ĝenerala intereso ankaŭ alia okazintaĵo helpis la propagandon en Kalocsa: oni invitis sinjoron Kola Ajayi, la fervoran samideano el Nigero, kiu per siaj lumbildprezentadoj, kantoj kaj propagandparoladoj ĉie vekis plej grandan interesiĝon inter la esperantistaro. Post longa kaj peniga prepara laboro finfine oni sukcesis aranĝi la prezentadon kaj la propagandvesperon. Kunvenis kun Kola Ajayi ankaŭ sinjoro Sándor Bakó kiel kursgvidanto.

Tuj post la alveno de la gastoj, la 5-an de oktobro, okazis la unua prezentado ĉe la Patroj Jezuitoj en la granda kolegia salonego. Pleniĝis la ejo per la studentoj de la gimnazio, de la seminario, de in-

struistoj kaj pastroj. Ankaŭ la profesoroj akompanis ilin en granda nombro. El la aŭdantaro varbiĝis tuj 80 kursanoj.

La tagon poste, la 6-an, lia ĉefepiskopa moŝto, Grafo Julio Zichy, tre bonvole akceptis la afrikan gaston sincere kaj interesiĝis pri la Esperanto-movado, kies landa ĉefprotektanto li estas. Longe li paroladis kun Ajayi pri Afriko kaj Nigero kaj fine li benis kun patra koro la gastojn kaj la movadon. Ankaŭ la helpepiskopa moŝto Gyözö Horváth tre kompleze akceptis la gastojn kaj deziris al ili plej grandan sukceson. En ekleziaj rondoj ĉie montriĝis la plej bonvola interesiĝo pri la prezentado de Ajayi kaj pri la propagando de Esperanto. Ĉi-tage posttagmeze okazis la dua propagandoprezentado en la instituto de la fratulinaj de « Notre Dame », kiu havas grandegan lernejon por instruistinoj kaj diversa aliaj lernejoj: burĝajn kaj popolajn. En ĉi-tia domo, kiel en centra domo, oni edukas la monaĥinojn kaj profesorinojn. La enkondukan paroladon faris pastro Zsiros, jezuito, delegito de IEL. La sukceso de Ajayi estis grandega. La knabinoj, la kandidatoj, eĉ la profesorinoj kaj instruistinoj fariĝis fervoraj adeptantinoj de Esperanto. Pli ol 180 studentinoj, 15 profesorinoj el la fratulinaj kaj 20 kandidatinoj aliĝis al la kurso.

La ĉefa lumbilda prezentado okazis la tagon poste, la 7-an de oktobro, vespere en la Katolika Rondo, kies salonego pleniĝis malgraŭ la malfavora vetero. La pluvego ne povis retenigi la homojn, kiuj

kun ni. Ĉiuj povas multe helpi, sed antaŭ ĉio skribu dankleteron al la prepara komitato de la 34-a Eŭkaristia Kongreso (Budapeŝto, Hungarujo, Ferenciek tere 7) kaj petu esperantlingvajn propagandbroŝurojn kaj afiŝojn! Ni petas vin ke vi bonvolu poste traduki la invitolojn de la Eŭkaristia Kongreso en naciajn lingvojn kaj publikigi artikolojn pri la kongreso, kaj ankaŭ pri nia Esperanto-laboro en la kadro de la Kongreso sendante unu ekzempleron de tiuj artikoloj al ni.

Ni promesas al vi ke ni konstante sciigos la tutan esperantistaron pri la laboro de nia Esperanto-Subkomitato. Ni volas ke nia laboro estu komuna afero de ĈIUJ esperantistoj. En la venonta okazo ni publikigos la laborplanon de la subkomitato kaj ties estraron.

Ni esperas, ke tra la tuta Esperantujo unu voĉo aŭdiĝos: *Propagandu, propagandu Esperanton inter la partoprenantoj de la 34-a Eŭkaristia Kongreso de Budapeŝto*, ĉar tie oni uzos la internacian lingvon en la komunikado inter la diversaj nacioj kaj popoloj de la tuta homaro!! Prof. D-ro Francisko Erdey.

vere kun granda ĝojo ĝuis la prezentadon de Ajayi. Li prezentis per siaj lumbildoj la pasintan vivon de la afrikaj negroj. Tre bele li prezentis la popolan vivon, la familian kaj publikan vivon de la negroj. La lando kaj la malnova religio, la kutimoj de la popolo, kaj la arta sento de la gento Yoruba vere donis plenan bildon de la nigera vivo. La lumbildprezentado sekvis kelkaj nigrulaj kantoj, kiujn Ajayi akompanis per originala, afrika tamburo. Li parolis esperantlingve al aŭdantaro, kiu neniam aŭdis Esperantan paroladon, sed Prof. D-ro Ferenc Erdey, la delegito de IEL en Kalocsa, ĉion interpretis kaj tuj faris propagandparoladon por la internacia lingvo, kies utilecon kaj belecon la aŭdantaro ĵus spertis.

La efiko estis dum ĉiuj prezentadoj grandega. Oni invitis Ajayi prelegi en la Industria Rondo, en la Teologio de la urbo, kaj ĉie oni varbis multajn novajn adeptojn por niaj movado kaj lingvo. Sándor Bakó, la kursgvidanto, vere havos grandan laboron, ĉar dek kursoj organiziĝis entute kun pli ol 400 partoprenantoj. La laboro komenciĝis tuj post la prezentado kaj daŭros ĝis Kristnasko. Oni esperas ke vigla Esperantovivo komencos en la malnova ĉefepiskopa urbo Kalocsa.

Jen agado praktika!

1178 per-Esperantaj turistoj dum unu somero.

Dum 1937 la estona Esperanta Turista Komisiono, fondita en 1930, akceptis, enloĝigis kaj gvidis en Estonio 733 eksterlandanojn, kiuj restis en Estonio entute 4921 tagojn. Plej multaj vizitantoj venis el Svedlando: 527 personoj. Sekvas Ĉeĥoslovakio kun 131, Finnlando kun 32, Latvio kun 30, Danujo kaj Norvegio kun po 3 personoj. Po 1 gasto venis el Aŭstrio, Litovio, Francujo, Germanio, Jugoslavio, Hungario kaj Japanio.

Samtempe EToKo sendis al aliaj landoj, ĉefe al Svedujo kaj Finnlando, 11 ekskursojn kun 395 partoprenantoj. Interne de Estonio ĝi aranĝis aŭtobuse kaj fervoje 10 rondvojaĝojn kun 277 partoprenantoj, inter ili 121 eksterlandanoj. Dum la somero EToKo havis 3 salajratajn oficistojn kaj 2 konstantajn turistgvidantojn.

Partoprenantojn al siaj ekskursoj EToKo varbis per afiŝoj, sennombraj gazetanoncoj kaj specialaj prospektoj, elspezante por la reklamo preskaŭ 1000 sv. frankojn. Sekve de tio la ekskursoj konsistis ĉefe el neesperantistoj, kiuj, uzante la modelajn, sindonajn kaj lertajn servojn de la esperantistoj, konvinkiĝis pri la utileco kaj praktika valoro de Esperanto, rekomendante ĝin ankaŭ al siaj amikoj kaj konatoj. H. Seppik.

kongreso! Kia grava fakto por nia movado!

Ni havas nun oficiale rajtigon por ĉiu Esperanto-laboro dum la preparo de la 34-a Eŭkaristia Kongreso. La Esperanta propaganda broŝuro en 10.000 ekzempleroj aperos antaŭ la fino de septembro, kaj Esperanto-afiŝoj ankaŭ en mallonga tempo.

Karaj gesamideanoj! Plej koran dankon al la Plejsankta Eŭkaristia Savanto, kiu benis la laboron de esperantistoj kaj permesis, ke ĝuste Lia Kongreso estu la komenco al la plena venko! Jen, la unua Mondkongreso, kiu estu la komenco de l' enkonduko de nia kara lingvo en ĉiujn aliajn mondkongresojn. Sed dankon ankaŭ al nia kara samideano Broens, kiu bonvolis nin helpi per sia letero al la prepara komitato Vidu, kian gravan signifon havas, se ni esperantistoj demandas kaj ne ĉesas konstante urĝigi la enkondukon de nia lingvo en diversajn kunvenojn kaj instituciojn!

Nun komencas la granda laboro por la Esperanto-Subkomitato, kaj ni petis ĉiujn karajn gesamideanojn kunlabori

Ni estis atestantoj pri okazo de historia signifo : Opero "Kiso" de Smetana en Esperanto-traduko dissendita de ĉeĥaj stacioj, relajsita de Lyon PTT kaj de litovaj stacioj

Jaŭdo vespere, 21.50 laŭ nederlanda horo. Ni eksidas antaŭ la ricevilo, turnas butonon.

Sibleto — eklumiĝas la skalo; susuro — varmigiĝas la valvoj.

Nun alvenas la unuaj sonoj. Komence mallauĝe, poste pli kaj pli laŭtigante. Kiu stacio? La paralelstria indikilo montras ankoraŭ Hilversum. Ĝin ni aŭskultis en la posttagmezo

Ni turnas la indikilon butonon: rapide la paraleloj glitas sur la skalo dekstren.

Jen la strioj kaptis inter si Lyon PTT! Ne jam finiĝis la antaŭa programo.

Jen ankaŭ Praha tuj apude. La distanco inter Lyon kaj Praha estas nur kelkaj milimetroj. Neniam mi pripensis, ke tiuj du urboj situas tiel proksime unu ĉe la alia — en la regno de la ondoj.

Estas amuze kurigi la stacio-indikilon tiujn kelkajn milimetrojn dekstren kaj maldekstren por aŭskulti jen al Lyon jen al Praha.

Nun Lyon finas... kaj jam anoncas ke ĝi relajsos la Esperanto-programon de Brno.

Brno estas per nia aparato ne tiel facile ricevebla, tial ni preferas Praha, aŭ nunfoje ankaŭ Lyon, kiuj venas egale bone.

Paŭza signo. Ĝi daŭras al ni tro longe. Malpacience ni atendas. Post kelkaj momentoj ni ja estos atestantoj de historie grava okazo: ni estos aŭskultantaj la unuan internacian relajson de arta Esperanto-programo. Kaj, kiel ni ĵus aŭdis, relajsos ĝin ne nur la franca stacio Lyon PTT — pri kio ni jam estis informitaj, sed ankaŭ la litovaj stacioj Kaunas kaj Klaipeda (Memel)!

Nun venas voĉo el Brno. Voĉo klara, simpatia. Preskaŭ tro longa ŝajnas al ni la franclingva indiko, kun klarigo pri la enhavo de la opero. Sed ĝi estis necesa, kaj utila, por la multaj neesperantistaj aŭskultantoj, kiuj en tiu ĉi horo same kiel la esperantistoj de tuta Eŭropo sidis ĉe siaj aparatoj.

Kaj nun la uverturo kaj, poste, la nontoj! Mi ne estas eksperto pri muziko, kvankam muzikon mi tre amas. Mi povas nur diri: jen ĝi plaĉas al mi, jen malplaĉas. Ĉi tiu muziko tuj kaptis nian koron. Oni sentas ke ĝi povas deveni nur el la brila talento de dibenita sonmajstro, kaj — laste — el la riĉa animo de profunde sentanta popolo. Muziko estas samtempe nacia kaj internacia. Kvankam ĉerpanta kutime el la nesek-

igebla fonto de la nacio, ĝi estas kaj restas internacie komprenebla. La sonoj estas neŭtralaj, sed per ili oni povas esprimi la plej profundajn sentojn, kiuj vicas en la animo de ĉiu nacio. Same kiel sur lingva kampo Esperanto, esence neŭtrala, estas bonega rimedo por transigi plej valorajn ideojn kaj pensojn de iunaciano al anoj de ĉiuj nacioj en la mondo. Tial Esperanto estas ankaŭ la plej konvena lingvo por internacia relajsado de operoj kaj kantoj.

La internacia relajsado de « Kiso » tion pruvis. Ĝi estis plena sukceso. La vortoj ĝenerale venis klare elparolitaj al niaj oreloj, — kaj la ceteron por bone komprenigi la agadon faris la kunligantaj vortoj de l' indikisto, kiu parolis klare, agrable, facilkompreneble.

Ankoraŭ postsonas en oreloj kaj koroj la pentaveplendo de Lukaŝ, la belega alaŭda kanto el la lasta akto, la jubila finalo...

Unu deziron ni esprimu: ke la nova senduba sukceso, kiun la « verda stacio » Brno akiris per la dissendo de tiu ĉi opero, estu al ĝi instigo por daŭrigi kuraĝe kaj senhalte sur via vojo.

Hodiaŭ la mondo, eble, ankoraŭ ne tre konscias pri la signifo de tiu unua internacia relajso de arta Esperanto-programo. Sed venos tempo, kiam la dato de la 7-a de oktobro 1937 estos per oraj literoj engravurita en la historio de la radio, en la historio de la muziko, en la historio de la tuthomara kulturo.



Interesa dokumento

Nia klišo montras koverton riceviton el Rio de Janeiro, kiu surhavas ĉiujn kvar poŝtmarkojn kun Esperanto-teksto eldonitajn ĝis nun de la Brazila Poŝto. Inter ili troviĝas ankaŭ la nova, kaj plej bela el ĉiuj, eldonita okaze de la Ora Jubileo de Esperanto.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 48. 23-an de Septembro, 1937.

NOVAJ DELEGITOJ.

Jugoslavujo.

Novi Sad. — D: M. Vrtunski, Direkcija svilarstva.
Osijek (Savska Ban.). — FD. (Komerco): F. Inself, Pejaceviceva 33.
Tuzla (Bosnio). — D: H. Odobasic, Aleksandrova ul. 42.
Zagreb. — FD (Juro): D-ro I. Lapenna, Dezeliceva 44/II.

Usono.

Atlanta (Georgia). — D: D-ro C. Stockard, 1028, Candler Building.
Cleveland (Ohio). — D: V. A. Welman, Room 760, Hippodrome Building.
Columbia (S. Carolina). — D: V. Dibble, 1021, Pope Street.
Little Rock (Arkansas). — D: F. Post, 2901, Marshall Street.

ŜANĜOJ.

Britujo.

Burnley (Lancashire). — Nova D: J. E. Whitaker, 121, Rosehill Road.

Hungarujo.

Ujpest (Pest). — Nova D: A. Frank, Ráro Eöt-vös Jozsef ucca 20.

JARLIBRA SUPLEMENTO.

Ĝi estas nun ĉe la presejo kaj estos sendata al ĉiu paginta individua membro je la komenco de Oktobro. Se iu membro ne ĝustatempe ricevos ĝin, li bonvolu senprokraste sciigi la Centran Oficejon.

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 49. 1-an de Oktobro, 1937.

ĈEF-DELEGITO.

Estas elektita kiel Ĉef-Delegito por Jugoslavujo la antaŭa Peranto:
 D-ro Ivo Lapenna, Dezeliceva 44/II, Zagreb.

NOVAJ DELEGITOJ.

La sekvanta informo venis tro malfrue por presigo en la Suplemento.

Francujo.

Charleville (Ardennes). — D: M. Desray, 15, Avenue Jean Jaurès.
Dunkerque (Nord). — FD. (Vizitantoj): R. Le Moine, 13, rue des Chaudronniers.
Fresnes-sur-Escaut (Nord). — D: J. Aldebert, rue Emile Zola 90-92.
Igny (Seine et Oise). — D: A. Miquière (patro), 31, Ave. de la République.
Montrouge (Seine). — D: E. Gaudry, 75, Route de Chatillon.
Rethel (Ardennes). — Nova D: R. Damase, Rue Chanzy.

ŜANĜOJ.

Pro translokiĝo provizore ne estas Delegitoj en:

Britujo.

Guildford. — Saffron Walden.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Septembro, 1937:

Asociaj Membroj	9122
Individuaj Membroj:	
MJ	1126
MA	989
MAH	248
MS	133
DM	74
HM	31
Patronoj	13

— 2614

11736 en 60 landoj.

Korespondantoj.

Centra Oficejo (en la gazetoj) dum Septembro, 1937:

Ricevitaj	559
Senditaj	500

1059

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

INTERNACIA KONKURSO.

Stato je la 30a de Septembro 1937.

POENTOJ

	1935	1937	%
1. Norvegujo	120	570	475.0
2. Aŭstrujo	255	714	280.0
3. Danujo	585	1118	191.1
4. Hungarujo	490	614	125.3
5. Grekujo	110	137	124.5
6. Usono	1264	1456	115.2
7. Italujo	560	591	105.5
8. Britujo	6469	6268	96.9
9. Nov-Zelando	210	200	95.2
10. Litovujo	150	135	90.0
11. Aŭstralio	470	419	89.1
12. Bulgarujo	75	65	86.7
13. Belgujo	2081	1722	82.7
14. Svedujo	2984	2439	81.7
15. Azio	1615	1264	78.2
16. Sud-Ameriko	1025	799	77.8
17. Portugalujo	395	307	77.7
18. Kanado	100	74	74.0
19. Francujo	7909	5645	71.4
20. Nederlando	4815	2767	57.5
21. Ĉeĥoslovakujo	4040	2019	50.0
22. Polujo	685	293	42.8
23. Jugoslavujo	615	242	39.3
24. Afriko	395	137	34.7
25. Finnlando	195	61	31.3
26. Latvujo	265	55	20.8
27. Rumanujo	400	45	11.2
28. Svislando	1410	137	9.7
29. Estonujo	130	5	3.8
30. Hispanujo	2080	15	0.7

41897 30313 72.3

Meza%

FRUTEMPE REPAGU

vian IEL-kotizon por 1938!

Oficiala Informilo

N-ro 50. 15-an de Oktobro, 1937.

NOVAJ DELEGITOJ (ne en la Suplemento):

Aŭstrujo.

Kirchberg (Tirol). — D: Pastro J. Kaps.

Francujo.

Vaires (Seine et Marne). — D: F-ino M. Chavenas, 82, Rue A. Manceau.

Maroko.

Port Lyautey. — D: C. Thollet, avenue Clemenceau.

Polujo.

Bydgoszcz. — D: E. Fethke, Wiatrakowa 14.

ŜANĜOJ.

Aŭstrujo.

Innsbruck. — D: (Nova adreso) R. Kühbacher, Schulgasse 10.

Britujo.

Coventry. — FD: (Nova adreso) S-ino W. E. Hailstone, 2, Barras Lane.

Walsall. — D: (Nova adreso) W. Everton, 33, Broadway North.

Ĉeĥoslovakujo.

Reichenberg. — FD. (Juro): D-ro E. Gruber eksigis pro malsano.

Francujo.

Dunkerque. — FD. (Vizitantoj): A. Bernaert translokiĝis.
 Por nova FD. vidu Informilon 49.

Les Lilas. — D: (Nova adreso) S-ino Daniel, 20, Rue de Bellevue.

Nederlando.

Apeldoorn. — La D., S-ro T. C. Reininga, mortis.

Polujo.

Lwów. — D: (Nova adreso) J. Toczyski, ul. Rutowskiego 21.

FD: (Nova adreso) K. Klein, ul. 29 Listopada 34.

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Ni funebras

S-ino JULIETTE VATRE-BAUDIN, edzino de la IEL-delegito en Genève (Svislando), mortis la 11-an de septembro. S-ino Vatré deĵoris kiel sekretariino de ICK dum multaj jaroj kaj senĉese laboris por Esperanto. Ŝi estis tre ŝatata de ĉiu, kiu ŝin konis, kaj ŝia tro frua forpaso — en la aĝo de nur 27 jaroj — estos dolore sentata de multaj geesperantistoj. Al s-ro Vatré kaj al la familio ni esprimas nian sinceran kunsenton.

— S-ro JOHN THOMAS HOLMES mortis la 20-an de septembro, 68-jara, en Torquay (Anglujo). Dum multaj jaroj li estis tre agema laboranto por nia movado en Anglujo kaj aliaj landoj. Li estis prezidanto de la grupo en Bradford, de la Yorkshire-Federacio kaj vicprezidanto de BEA dum multaj jaroj. Li kaj lia edzino estis bone konataj al esperantistoj en diversaj landoj, kaj ĉiu kunsentos kun la vidvino kaj la familio pro ilia perdo.

— S-ano REININGA, prezidanto de la loka sekcio Apeldoorn (de nederlanda esperantista unuigo LEEN), vicprezidanto de la klubo « Progresado » kaj delegito de IEL en Apeldoorn, Nederlando, subite mortis en la aĝo de 51 jaroj. Li ne estis malsana, sed trafis lin korafekcio. Lia laboro kaj lia nomo restos en nia honora memoro.

Interŝtata Esperanto - Akordo

(Mallongigo: IEAk-movado.)

Ĉefideo plej mallonge (24 vortoj): Ses ŝtatoj reciproke inter si promesas: « Ni enkondukos Esperanton devige en ĉiujn lernejojn de nia lando, se vi la samon ĉe vi promesos fari ».

Provizora ĉefgvidanto: D-ro Antoni Czubrynski, Wlochy pod Warszawa, Wesola 32. Varsoviaj rezolucioj akceptitaj dum plena kunsido de 29-a Universala Esperanto Kongreso:

a) **Rezolucio** de D-ro Antoni Czubrynski por interna uzo de esperantistoj (10.8.1937, dum la kunsido de TAGE):

La kunvenintoj dum la kunsido de TAGE de 29-a Universala Esperanto Kongreso en Varsovio decidis reŝanĝi la klopodojn koncernantajn la realigon de Interŝtata Esperanto Akordo (IEAk) celanta la samtempan enkondukon de Esperanto kiel devigan lernobjekton en ĉiujn lernejojn de la mondo, se ses ŝtatoj la samon promesas.

Por tiu ĉi celo oni decidis:

inter esperantistoj:

1) organizi interkonsente kun Landaj Asocioj la Landajn Komitatojn por Realigo de tiu ĉi IEAk;

2) popularigi pere de ili prese kaj prelege la ideon pri IEAk inter rondoj esperantistaj;

inter ne-esperantistoj:

3) plebiscito inter ne-esperantistoj por IEAk per varbado de fakaj asocioj, korporacioj, societoj ktp. neesperantaj en ĉiuj landoj parte aŭ entute por tiu ĉi ideo, ke ili subtenu la celadojn de esperantistoj ĉe iliaj propraj registaroj pri IEAk;

4) varbado de politikaj partioj, grupoj, blokoj ktp., ke ili enmetu en sian programon la postulon al siaj registaroj subteni tiun ĉi ideon;

5) vasta propagando en ĉiu lando de la ideo en larĝaj amasoj, kolektado de la rezolucioj kaj petskriboj de diversaj pli konataj homoj favoraj al tiu ĉi ideo;

6) varbado de la deputitoj en parlamentoj (eventuale kantonoj, ŝtatoj en Usono ktp.), laŭ landaj kondiĉoj;

7) prezentado de la ideo pri IEAk al ministroj de klerigado kaj ekstere (laŭ landaj kondiĉoj) kun la peto, ke la koncerna lando aliĝu al IEAk.

Postuloj pedagogiaj:

Preparo de la instruistoj kaj ilia diplomigo, verkado de necesaj lernolibroj kaj legolibroj, vortaroj.

Postuloj organizaj:

La kunvenintoj de la 29-a kongreso de TAGE decidis dum tiu ĉi kunveno por bona aranĝo de preparaj laboroj peti ĉiujn redakciojn de naciaj Esperanto-jurnaloj kaj revuoj, malfermi la kolonojn por la presado de la sciigoj kaj cirkuleroj pri IEAk en la periodo komenca antaŭ la konsolidiĝo de la komitatoj por realigo kaj eventuale antaŭ speciala organo dediĉita al IEAk-movado.

b) **Rezolucio** por ekstera uzo propaganda (presota jam en esp. revuoj).

Teksto de la Akordo (france) por subskribo ai la ŝtatoj: proponata antaŭe per UEA kaj ICK:

Les états signataires, reconnaissant l'importance de répandre l'usage d'une langue auxiliaire pratique pour faciliter les communications internationales, déclarent être prêts à introduire graduellement dans leurs écoles publiques l'enseignement de l'esperanto lorsqu'il y aura au moins six états signataires du présent accord.

Le présent accord n'entrera en vigueur que lorsque il y aura six états signataires. L'original en français et en esperanto sera déposé entre les mains du Secrétaire Général de la Société des Nations et restera ouvert à la signature de tous états désireux d'y adhérer par la suite.

Les états signataires restent libres de choisir la mode d'application du présent accord qu'il jugeront le mieux approprié à leur organisation scolaire. Ils s'engagent à informer le Comité International de l'esperanto, à Genève, des mesures qu'il décideront de prendre à ce sujet, soit par disposition législative, soit par décret administratif.

Literaturo pri IEAk-movado:

a) en maja numero de Ĝeneva «Esperanto»;
b) artikolo en Ĝeneva Ora Jarlibro de UEA por jaro 1937, paĝoj 185-203 kaj eldonita aparte kiel represajo dum Varsovia kongreso;
c) Ora Libro, paĝo 148 kaj sekv.

Ĉeforgano ankoraŭ ne ekzistas. Provizore la komunikoj de la ĉefgvidanto estos sendotaj al: Heroldo de Esperanto, al ĉeforganoj de UEA kaj IEL, al Aŭstria Esperantisto ĉe Esperanto-Muzeo en Wien. Naciaj Esp.-organoj bonvolu ilin ripeti.

Komunikoj de ĉefgvidanto:

a) Oni petas naciajn Komitatojn por la realigo de IEAk sciigi nin pri taŭgaj agantoj, kiuj volus sin dediĉi al tiu ĉi grava movado organizante ĝin laŭ la direktivoj de rezolucio a). Estus dezirinde, ke tiuj ĉi samideanoj ne pritraktu tiun ĉi laboron kiel akroĉaĵon al iu alia, kvankam Esperantalaboro, ĉar ili ne plenumos bone gravan taskon, kiun ili prenos sur siajn ŝultrojn, sed dediĉu sin nur ekskluzive al IEAk-movado.

b) Se estas necese, libreto pri IEAk-movado disdonita dum Varsovia 29-a Kongreso povas esti represata parte aŭ entute, ĉar aŭtoro rezignas pro la bono de IEAk-movado pri la aŭtorrajtoj. Nepra estas tamen sciigi la aŭtoron pri eventuala eldono.

c) La raportojn pri la progreso de preparaj laboroj por IEAk-movado vi unue presu en viaj esperantistaj naciaj organoj kaj poste sendu ilin al la ĉefgvidanto. Evitu malnecesan korespondadon!

La venonta jarkongreso de Leen

Kiel estas decidite en la pasinta jarkunveno en Den Helder, la nederlanda neŭtrala Esperanto-asocio « La Estonto Estas Nia » organizos sian venontan kongreson (1938) en la ĉefurbo Amsterdam. Ĉi tiu kongreso estos la deka; ĝi do havas gravan signifon por la unuiĝo. La naciaj kongresoj de LEEN trovas ĉiam kreskantan intereson, ne nur ĉe la nederlandanoj, sed ankaŭ ĉe niaj eksterlandaj samideanoj. En Den Helder, ekzemple, ĉeestis proksimume 20 eksterlandaj partoprenantoj. Kelkaj el ili eĉ estas regulaj vizitantoj. Ilia ĉeesto donas internacian sferon al la kongresoj.

Ankaŭ la naciaj kongresoj ja ne nur signifas la preparoladon de unuiĝaj aferoj. Ilia ĉefa celo estas plifortigi la ligan inter la anoj de la diversaj sekcioj (grupoj). La revido de konatoj, la interkontaktiĝo kun novaj samideanoj, la restado en Esperanto-medio ĉiam donas novan entuziasmon por la afero.

Sed, flanke de tio, la partoprenantoj volas utiligi sian viziton por iom ekkoni la kongresurbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn. La tasko de la kongreskomitato estas aranĝi ekskursojn al vidadaj lokoj. Koscia pri ĉiuj tiuj aferoj, la Amsterdama sekcio faros sian eblon, kiel eble plej bone plenumi ĉiujn postulojn. La praktiko montras, ke la preparoj por kongreso postulas multan laboron. Tial la Amsterdama sekcio jam nun starigis la komisionojn, kiuj prizorgos la diversajn partojn de la aranĝado. Antaŭ kelkaj semajnoj tiuj komisionoj unuafoje kunvenis. Pri la rezultatoj ni ankoraŭ ne povas fari komunikojn, ĉar la planoj estas ankoraŭ nur provizoraj. Poste ni esperas doni pli detalajn informojn. Tamen oni povas esti certa pri bona programo.

Ni do istigas niajn eksterlandajn amikojn, kapti ĉi tiun eksterordinaran okazon por vizito al nia ĉefurbo. La kongreso okazos je pasko 1938. Vi certe ne bedaŭros vian partoprenon. Nederlando, « la verda lando », atendas vin.

Korespondadojn, aliĝojn ktp. oni sendu al la sekretario de la LKK, f-ino C. Keller, Frederik Hendrikplantsoen 104, Amsterdam-W.

Norvega Esperanto-kroniko

Norvega Esperantista Ligo dum la lasta tempo faris multajn decidojn, kiuj verŝajne bone influos je la ĝenerala progreso de la movado. Mi menciui nur kelkajn ĉefaferojn kiuj povus interesi alilandajn legantojn.

Propagando. — NEL nomis s-ron Arnfinn Jensson, kiu dum la du lastaj jaroj funkciis kiel ĝen. sekretario de la Ligo, estro de propagando. Lia tasko estas organizi kaj gvidi la tutlandan propagandon, kunordigi la jam ekzistantajn propagandajn subĉefojn kaj subkomitatojn, kaj laŭeble krei novajn.

Per diversaj rimedoj oni havigos monon al la propaganda fondaĵo, kiu kreigis antaŭ kelkaj monatoj. Ĝi espereble povos post kelka tempo aktive helpi en la laboro.

« **Amikoj de Esperanto** » nomiĝas speco da neaktivaj membroj, kiuj pagas jare po kr. 1.—. Por stimuli la intereson, oni dislotadas inter ili ĉiujare premion, kaj la neta enspezo aldoniĝos al la propaganda fondaĵo.

Esperanto-distriktoj. — Dum la lasta ĝenerala kunveno de NEL oni akceptis aldonon al la statutoj, kiu permesas organizi distriktajn unuiĝojn de la Esperanto-klubo. Kvankam ĝenerale estas grandaj distancoj inter la norvegaj kluboj, fondiĝis ĝis nun jam du distriktaj suborganizaĵoj, nome en la gubernioj Rogaland kaj Troms, Prezidanto de la unua estas s-ro Olav Thormodsen, Haugesund, de la dua s-ro Saxer

Ebeltoft, Harstad.

Gazetaro. — Dum la unua duonjaro 1937 la Gazetara Komitato registris proks. 900 artikolojn pri Esperanto en 125 gazetoj. Por 1935, la suma nombro estis 900. Gaz. Komitato nun havas 41 reprezentantojn en diversaj urboj, kaj proks. 150 gazetoj ricevas ĉiusemajne ĝiajn artikolojn. Per multaj signoj ni konstatas ke la pergazetara propagando efikas. La ĝenerala publika intereso kreskas, kaj ni havas la impreson ke la rezulto estos pli bona ol per aliaj pli trudemaj kaj pli multekostaj metodoj. Certe la pergazetara propagando estas farinda kaj farebla en ĉiu lando. Sed memoru: Ĝi devas esti sisteme organizita!

La gazetara laboro prezentas nelimitajn eblecojn, de kies eluzo multo dependas.

Turismo. — NEL per sia komisiulo por turismo, f-ino Liv Sandberg, multon atingis sur tiu kampo. Ĝus fondiĝis Esperanta Turista Asocio, kies estraro, Esperanta Turista Komisiono, komencos viglan laboron. Ĝia ĉeftasko estas aranĝi malmultekostajn vojaĝojn al aliaj landoj, speciale al la internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. Sed ĝi ankaŭ laboros pri organizado de esperantistaj turismaj aranĝoj en Norvegujo, kaj faros ĉion por progresigi la turismon entute. La ETK konsistas el jenaj personoj: Prez. Arnfinn Jensson, vicprez. f-ino Liv Sandberg, sekr.-kas. f-ino Oyrunn Bertrand.

PROPAGANDO

Propaganda prelego farita dum la Jubilea Kongreso en Varsovio de E. Malmgren

1. Jubilea kongreso — revolucia kongreso.

Amikoj, kunlaborantoj,

Por la unua fojo en la historio de Esperanto estas nun aranĝata speciala laborkunsido por trakti la esencajn problemojn de Esperanto: la metodojn por venkigi nian lingvon.

Tiu fakto estas tre esperiga, ĉar ĝis nun dum ĉiuj kongresoj la plej ĉefa kaj plej ŝatata temo estis la organiza demando. Nia movado similis al komunumo, kiu decidis konstrui urbdomon, sed kiu dum 50 jaroj disputis pri la elekto de la domestraro kaj de la arĥitekto. Kaj tiel oni forgesis konstrui la domon!

Sed nun, amikoj, nun venis la tempo por fine komenci la laŭplanan laboron por Esperanto.

Ni spertis ja dum 50 jaroj, ke hazardaj atakoj kaj hazardaj sukcesoj ne donas konsiderindajn venkojn al Esperanto. Sed ni devas nepre krei disciplinon en niaj vicoj. Tamen mi akcentas, ke disciplino ne signifas submetiĝo sub la gvidantoj. Ĉe ni esperantistoj la vorto disciplino signifas, ke ni respektas kaj agas laŭ la direktivoj kaj ordonoj de la gvidantoj, sed je fino de la agadjaroj la faroj de la gvidantoj estas kontrolataj kaj kritikataj de revizoroj kaj de la esperantista parlamento.

Jes, ni nun atingis novan epokon de Esperanto. Ni venis al la *labora* periodo de Esperanto. Per tio mi ne volas diri, ke oni antaŭe ne laboris. Ho jes, oni multe laboris — kaj antaŭ ĉio oni multe parolis. Nun ni ankaŭ devos multe paroli — sed eĉ pli praktike labori.

Mi eĉ volus diri, ke la ĝisnuna periodo estis la *amuzo* periodo: Esperanto estis kvazaŭ ŝatata ludilo aŭ kiel dorlotita infano. Nun ni atingis la punkton, kiam Esperanto devos fariĝi ne ludilo sed vivkondiĉo por multaj personoj. Nun for la diletantismo!

Kaj nun, samlingvanoj, nun montrigos, kiuj el vi havas en la brustoj « la internan ideon ». Ĉar « la internan ideon » ne posedas tiuj, de kies lipoj oni aŭdas multajn belajn vortojn. Sed ĝin posedas tiuj laborantoj, kiuj en la ĉiutaga pena insista laboro batalas por nia afero. Ne temos pri unuhora aŭ eĉ unusemajna ekflamo por Esperanto — sed temos pri konstanta persista laboro laŭ starigita sistemo. Jes, forpasis nun la entuziasmaj festotagoj kaj alvenis la streĉaj labortagoj! Ĉu vi estas preta kunlabori?

2. Ĉiuj kunlaboru!

Mi ne povas tro ofte kaj tro forte akcenti la gravecon pri harmonia kunlaboro. Ĉar ĝuste per kunlaboro ni povos apogi unu la alian. Iu havas sperton en unu loko, alia en alia loko; iu akiris sperton pri unu afero, alia pri alia afero. Izola sperto ne multe signifas por nia movado, sed multaj spertoj kunigitaj signifas grandajn trezorojn por nia movado. Do ne hezitu komuniki al mi pri viaj spertoj aŭ novaj projektoj. Mi kolektos ilin je la bono de Esperanto.

3. La landaj asocioj.

Speciale mi turnas min al la estraroj de la landaj asocioj. Via intima kunlaboro kun IEL estas esence grava. Ĉar vi estas ja la generaloj, kiuj devas gvidi la batalon en la diversaj batalkampoj. Sed vi ankaŭ devas konstante komuniki al la centra generalstabo pri la stato en via kampo. Kaj antaŭ ĉio vi devos prikonsideri la projektojn, proponojn kaj ordonojn de la centro. Tiu generalo (= estraro), kiu ne plenumas tiujn postulojn, ne meritas daŭrige gvidi la armeon en sia lando, ĉar li ja kaŭzas, ke la centro blinde laboras.

Estonte la Filia Oficejo de IEL provos ĉiumonate distribui siajn cirkulerojn al la landaj estraroj. Kaj la estraroj nepre en kunsido traktu la faritajn proponojn. Poste la estraro raportu al IEL kaj ankaŭ en la enlanda Esperanto-revuo pri la decidoj faritaj. Tiel la esperantistoj vidos, ke ilia estraro ion faris por Esperanto (eĉ se la decido estos negativa rilate al tiu aŭ tiu punkto).

Vi rimarkas denove, al kio mi celas: For la diletantismo! Ek la raciaj laborometodoj!

4. Malnovaj konsiloj — sed bonaj konsiloj.

Kiam mi nun faros al vi konsilojn pri tiu aŭ tiu problemo, vi kelkfoje eble rimarkos, ke mi jam antaŭ unu jaro traktis la saman problemon. Jes, tiel estos. Sed kvankam vi jam aŭdis mian antaŭan konsilon, ne estas tutcerte, ke vi agis laŭe, ĉar mi bone konas la homan naturon: oni entuziasmiĝas por iu afero, sed intervenas malhelpoj — kaj poste oni forgesas! Nenio estas tiel malforta kiel memorkapablo! Sed mi helpos vin venki tiun malfortan flankon en via karaktero. Kaj estu certa, ke kune ni venkos: tio estas atestita en la steloj.

Tiel mi do komencos per :

5. La esperantista hejmo — la Esperanto-klubo.

La fundamento en la Esperanto-movado estas la kluboj. Ili estas kvazaŭ la esperantistaj familioj. Pro tio ni devas tre zorge flegi la klubojn. En ordinara ŝtato oni povas diri, ke la ŝtato fartas bone, se la familia vivo fartas bone. Same la Esperanto-movado fartas bone, se la Esperanto-kluboj havas harmonian kaj viglan vivon.

Ni do devas ĉiel penadi doni helpon al la kluboj rilate al ĝenerala gvidado kaj programproponoj. Precize kiel en la familia vivo oni devas en la klubo dividi la laboron inter la diversaj membroj. Ju pli oni dividas la laboron, des pli bone fartas la klubo, ĉar tiam la membroj sentas sin esti utilaj. Kaj tio kreas senton de respondeco rilate al la klubo. Multajn praktikajn konsilojn pri la kluba vivo donas la libro « La Esperanto-klubo » havebla por 2 internaciaj respondokuponoj ĉe la C. O. de IEL. Tiu libro i. a. enhavas konsilojn pri la fondo de Esperanto-klubo, pri diversaj programpunktoj, viva gazeto, biblioteko, publika propagando ktp.


(Daŭrigota)

Belga Esperanto-Domo



Ĝenerala aspekto de la nova Esperanto-domo en Antverpeno, Lange Leemstraat, 127. En ĝi estas ankaŭ instalita la Belga Esperanto-Instituto.

La Esperanto-Domo en Antverpeno



La elmontra fenestro de la bela, nova Esperanto-domo en Antverpeno, Lange Leemstraat, 127

Propono de Aŭstralia Senatano Abbott havas gravan sekvaĵon

Okaze de la Konferenco en Aŭstralio de The New Educational Fellowship (La Nov-Edükada Fratularo), en aŭgusto renkontiĝis en Canberra, F.C.T., Profesoro Pierre Bovet el Genevo kaj aŭstralia Senatoro Mac Cartney Abbott, kies proponojn akceptitajn de la Senato, oni anoncis en ĉi tiu gazeto. Temas pri la iniciato de Internacia Konvencio, laŭ modelo de la Patent- kaj Poŝt-Konvencioj, pri instruado de unu komuna lingvo en ĉiuj lernejoj de la mondo, kun la celo krei pli bonan interkomprenon inter la diversaj popoloj de la mondo, kaj forigi kaŭzojn de milito. La proponojn de Senatoro Abbott akceptis la aŭstralia Senato per 19 kontraŭ 5 voĉoj.

Senatoro Abbott komencis nun ekfundi Internacia Fellowship (Internacian Fratularon) por organizi propagandon por sia ideo pri la oficiala elektado de Internacia Lingvo (kiu povos esti iu alia ol Esperanto, se la esperantistoj mem ne estus agemegaj). Kiel sekvo de la antaŭaj raportoj pri la afero, la Senatoro ricevis multajn leterojn kaj kartojn el la tuta mondo, sed, ho ve!, ili ankoraŭ restas en granda sako, kaj pro manko de helpo kaj nescio de la lingvo la Senatoro ne povas ilin rekte respondi. Sed la afero ne restos tie. La senatoro havis personan intervjuon kun Prof. Bovet, kaj kompreneble la fama profesoro kuraĝigis la aŭstralianon pri lia projekto. Ankaŭ Prof. Bovet ĉie en siaj lekcioj forte propagandis por Senatoro Abbott, kaj revokis grandan intereson pri tio, kion

ĉiuj ekpensis nur esti kelktaga mirindaĵo.

Konsilinde estas ke la esperantistaro denove inundu Senatoron MacCartney Abbott, Parliament House, Canberra, F.C.T., Aŭstralia, per kiel eble plej multaj leteroj k.t.p. kaj ankaŭ faru alian agon en okazo ke vi volas nepran respondon pri la agado de la fondita Internacia Fellowship de Senatoro Abbott, t.e. se antaŭaj skribintoj kaj ankaŭ nunaj skribantoj al Senatoro Abbott volas nepran respondon, agu jene: Sendu en letero koverton, sur kiu estu skribita via nomo kaj adreso kaj en kiun vi metu ankaŭ respondkuponon (aŭ alian valorajn pli grandan, se vi volas helpi la agadon de la aŭstralia komitato), al S-ro L. Thomson (Repr. de « Literatura Mondo » en Aŭstralio), c/o R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne, Aŭstralio.

Melburna Komitato tiam respondos nepre al interesuloj pri la progreso de la Abbott'a afero.

Estas ankaŭ konsilinde, eĉ se vi ne volas nepran respondon personan, ke vi konigu al s-ro Thomson vian nomon kaj adreson, tiel ke la Aŭstralia Komitato scios senpere, proksimume kiom da respondoj ricevis Senatoro Abbott de alilanduloj esperantistaj. Dum, oni klopodos kun Senatoro Abbott kaj, se eble, aranĝos ke Esperanto estu oficiale uzata de la nova Fellowship fondita de Abbott, kiel perilo de korespondado.

L. Thomson.

La mondsprito suferas je artritismo...

La mondsprito, kiu, ŝajnas, eksaltos baldaŭ ĝis la eternaj steloj, malsanas je grava artritismo...

La sufero ne estas sufiĉe esplorita, ĉar mankas scienco pri spirita « ŝtofinterŝanĝo ».

Ni, kiuj deziras kuraci kaj reguligi la interlingvan penscirkuladon, devas nepre ekkoni ĝian nunan staton kaj disvolvi tiun novan sciencbranĉon.

Taŭga esplormetodo estas la statistiko, kun siaj rezultoj — klaraj, esprimfortaj.

Kiel elokvente, ekzemple, parolas sekvanta deven-tabelo de 594 resumoj, aperintaj dum 1936 en la plej disvastigita mezeŭropa scienca revuo (« Med Współczesna ») :

el lingvo	germana	197	
»	»	franca	141
»	»	rusa	114
»	»	angla	112
»	»	itala	29
»	»	ĉeĥa	1

Japanujo, Svedujo, Norvegujo, Brazilo, Hispanujo, Grekujo, estas nur kiel blankaj makuloj sur nia mondkarto; povas ŝajni, ke tie promenas ankoraŭ gigantaj mamutoj, detruante virgajn arbarojn... dum en laborejoj de elektraj urboj pulsas vivo; dum vicoj de modestaj sciencistoj ofertas ĝojgajn rivalojn, por tutanime batali kontraŭ potencaj naturfortoj kaj bakterioj, *ne distingantaj* ja lingvolimojn, ras- kaj naci-diferencojn, por esplori la mirindan melodion de koro, *ĉi saman*, sendepende de tio, ĉu ĝi batas laŭ takto de « Internacio » aŭ « Giovanezza ».

Ĉiutage naskiĝas ĉarmaj, diverslingvaj *epope-volumoj*, skribitaj per sango de kunikloj, kobajoj kaj de la homa koro, kiuj prikantas mitologian lukton kontraŭ nuntempaj monstroj kaj drakoj.

Kreskas tial senĉese bezono de koncizaj *resumoj-ekstraĵoj*, kristaligitaj sub premo de 200 atmosferoj, « sciencaj sonetoj ».

*

La gravan rolon de Esperanto koncerne plivigligon de la resum- kaj ide-interŝanĝo, mi jam priparolis en artikolo « Unua flugo Tokio-Warszawa » (Heroldo 11/1937); de tiu tempo sukcesis aperigi novajn resumojn el japana, rumana kaj sveda lingvoj (« Varsovia Med. Rev. », n-roj 7, 11, 12/1937), ĉiu'n kun rimarko « per Esperanto ».

La entreprenado marŝas antaŭen. Necesas nun helpo de fakuloj diverslingvanoj, kapablaj « eksporti » aŭ « importi » ideojn pere de *resumoj* (dumtempe *medicinaj*) 4-5-liniaj, *interesaj*, *plejbone el j. 1937* (sendi per aera aŭ simpla

Plu ne dubu!

Tamen ili helpas!

De Fento Stancliff kaj Rob. Betteridge.

(Ĉiu laŭ sia maniero.)

La Originala Verkaro de Zamenhof estas kolekto de preskaŭ ĉio kion verkis la plej kompetenta esperantisto. En ĉi tiu 600-paĝa libro estas la antaŭparoloj, traktoj, artikoloj, leteroj kaj poemoj. Ĉi tiu statistikaro, kompilita el ĝi, egalparte de la supre nomitaj analizantoj, montras definitive por ĉiam la oftecon de ĉiu unuvorta konjunkcio, kaj preskaŭ ĉiom el la duvortaj, kiun uzis la iniciatoro de Esperanto. Oni devas memori tamen, ke ĉi tiu nombraro montras librecan stilon, kaj ne intiman stilon por interparolo. Ankaŭ la tradukitaj verkoj de Zamenhof montras gravajn diferencojn. La intereso povos konsulti la Enciplopedion por statistiko pri aliaj temoj. En la Bulteno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, estas plena listo de aliaj esplortemoj pri statistiko. Vidu la numeron por julio 1937. Ĉu oni devas skribi ĈI TIU aŭ TIU ĈI? La T-korelativoj estas troveblaj por meti finon al dubeblo pri tio. Statistiko aperos baldaŭ pri la ofteco de ĉiu adverbo kaj de ĉiu adjektivo.

Kopio de la statistiko estas absolute malpermesata, kaj oni riskos malagrablan sekvon forgesinte pri tio.

kaj	5340	do	37
ke	2662	kiom	34
sed	1773	kial	28
se	1101	malgraŭ ke	25
aŭ	1024	kvazaŭ	21
ĉar	803	pro tio ke	2
kiel	573	por tio ke	2
ĉu	385	nu	1
kiam	347	sen ke	1
ol	299	tiu ĉi	873
tamen	184	tio ĉi	430
por ke	168	tie ĉi	61
(akcentita formo:)			
nek	141	ĉi tiu	20
kvankam	111	ĉi tio	4
ĝis	64	ĉi tie	8
dum	62	derivita adverb	
kie	50	konjunkcio:	
antaŭ ol	46	sekve	158

Rimarkoj: 1. DUM kaj ĜIS estas kalkulitaj nur kiel konjunkcioj, ne kiel prepozicioj; 2. La korelativoj estas kalkulitaj nur kiel konjunkciaj adverboj kaj ne kiel demandaj adverboj.

poŝto, en letero aŭ sur poŝtkarto; adr : Wilno, W. Pohulanka 15/30).

La ricevota materialo formos, versaĵe, dissendotan multobligitan bultenon.

En la lasta momento promesis jam sian daŭran kunlaboron ĉeĥoslovakaj kuracistoj.

En niaj manoj troviĝas brila kuracilo, kapabla reguligi la pertubitan « ŝtofinterŝanĝon » de la mondspirito.

D-ro Emanuel Epsztejn

Nun eĉ la avoj jam komprenas la ofte diritan frazon: « La mondo konstante pli kaj pli malgrandiĝas ». Jes, la ondoj de l'radio, la aviadiloj ktp. ne konas landlimojn, ili trasaltas la aeron de unu ŝtato al alia. Matene oni povas flugi al Londono, tagmeze al Berlino, vespere al Parizo, kompreneble dum unu tago. Kaj, kiu ne ŝatas veturi, restu trankvile en sia domo, li nur bezonas turni la radian funkciilon por aŭdi la diversajn staciojn de l' mondo.

Do oni pravas: la mondo rapide malgrandiĝas; ĝi malgrandiĝas eĉ tiel rapide ke multaj homoj ne tute kapablas sekvi tian — de ili mem kaŭzitan — rapidecon. Jam preskaŭ vivante je internaciaj cirkonstancoj ili malamas tiun vorton. La vorto « internacia » kaŭzas al ili timon, suspekton aŭ malkonfidon ktp., tute laŭplaĉe de la opinio de ĉiu unuopa. Nur ni esperantistoj ne timas, ni eĉ ŝatas la vorton, ĉar ni opinias « internacian pacon » kaj la kontraŭuloj « internacian militon » — tio estas la diferenco.

Bedaŭrinde — por tiuj ĉi kontraŭuloj — la tempo ne haltas, ĝi marŝas sian

Nederlanda Oficejo « Esperanto en la Lernejojn ».

La 2an de oktobro 1937 fondis suprenomitan oficejon: la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo (i.L.E.); la nederlanda katolika Esperanto-ligo « Nederlanda Katoliko » (N.K.); la nederlanda kristana Esperanto-ligo « Nederlandse Christelijke Esperanto-Vereniging » (N.C.E.V.) kaj la neŭtrala nederlanda Esperanto-asocio « La Estonto Estas Nia » (LEEN). Pro malfeliĉa hazardo la nederlanda sekcio de la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE) ne estis reprezentita la 2-an de oktobro, sed preskaŭ certe ni povos sciigi en nia dua komunikilo, ke ankaŭ ĝi kunlaborados.

Akceptis la prezidantecon por la unua jaro (ĝis 1939) s-ro P. W. Baas (LEEN) kaj la vicprezidantecon s-ro H. Damen (NK), dum la organizaj reprezentantoj nomis direktoro s-ron P. J. Seeuwen, Valeriusstraat 109, II Amsterdam-Z. Jen do la adreso de nia oficejo, kiu celas akceli la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

Ni esperas serioze kaj sisteme labori, por ke ni alproksimiĝu al la granda celo de ĉiu esperantisto. Ni informos vin de tempo al tempo pri nia laboro, niaj sukcesoj kaj malsukcesoj. Bone konsciu ĉiu, ke ni atingos nenion, se ni ne renkontos ĉies subtenon kaj helpon.

Ni do petas: ke el la tuta mondo oni sendu al ni la materialon, el kiuj ni forĝu la necesajn armilojn por nia batalo. (Esperanto-gazetojn, broŝurojn, priesperantajn artikolojn tradukitajn, ĝeneralajn, laŭ propaganda vidpunkto gravajn komunikojn, jarlibrojn; oni signu la koncernajn partojn); ke en aliaj landoj oni sekvu la nederlandan ekzemplon, ĉar nur per celkonscia kunlaboro kaj reciproka subteno ni iam atingos la celon.

P. W. Baas.

(Aliaj gazetoj bonvolu represigi nian artikolon.)

vojon kaj postulas sian rajton, ĝi eĉ devigas ilin kunlabori por atingi la homaran pacon.

Antaŭ kelkaj jaroj preskaŭ ĉiuj ŝtatoj komencis interŝanĝi studentojn, laboristojn, infanojn, eĉ militpartoprenintojn. La diversaj registaroj diris: « Por prepari amikecajn najbarajn interrilatojn ». Komence malgrandaj grupoj vizitis najbarajn landojn; sed iom post iom la grupoj konstante pli multigis kaj pli grandiĝis. Sed la laboro estas tre malfacila, por la partoprenantoj vera streĉado. Ili ja ne ĉiuj scipovas paroli la lingvon de la vizitata ŝtato. Do ofte nur parolas (ofte certe parolaĉas) la interpretistoj. Ili estas trenataj de festo al festo; ili vidas belegajn regionojn, urbojn, grandajn fabrikojn, konstruaĵojn kaj afable ridetantajn homojn. Estas kvazaŭ ili vidus belegan, sed por ili preskaŭ mutan mondon. Do ili neniam povas senti la animon de l' vizitata popolo, kiu ankaŭ sopiras je paco kaj amikeco.

Tamen ili vojaĝas hejmen, havante brilajn okulojn kaj ruĝajn vangojn. Jam de malproksime ili vokas al siaj parencoj kaj amikoj: « Estis belega vojaĝo, ĉie ni trovis amikojn ». Kion ili sentus, se ili scipovus paroli Esperanton, kaj povus vojaĝi al ĉiuj landoj, kaj povus paroli kun ĉiuj popolanoj!

La interŝanĝadon ili daŭrigas, kaj per tio ili helpas prepari la homaran pacon. Ĉu ili neniam aŭdis pri Esperanto? Eble vi, karaj gesamideanoj trovos okazon por atentigi ilin, ke jam de longe ekzistas komuna lingvo tre facile lernebla kaj nur celanta la paciĝon de l' homaro.

N. N.



Ĉu vi ne forgesis,
kion mi promesis?
Se vi versojn kalendarafas,
lin donac' agrabla trafas.
Nu, ne skribu por parado:
Ni konsilas rapidegi:
Ĝuaru tempon je l' skribado,
Ĉi da tempo restas legi.

Petu prospekton de
HEROLDO DE ESPERANTO
Scheveningen — (Nederlando)

Interesa Kongreso Internacia kun kvar oficialaj lingvoj kaj la... verda stelo

Finiĝis en Varsovio la 21-a Internacia Kongreso de Abstinuloj. La kontraŭalkohola movado ĉiam pli disvolviĝas, same kiel ĉiam pli intense disvolviĝas la alkoholkonsumado — kaj ĉefe la teruraj efikoj de la alkoholtrinkado. En iom simila al la Esperanta movado troviĝas nun tiu de la abstinuloj: en multaj landoj kreskis forta naciismo, kiu sin kontraŭstaras al Esperanto, — en multaj landoj kreskis la budĝetaj enspezoj pro alkoholkonsumado — kaj jen venas tiuj « malamikoj al ŝtataj enspezoj » kaj kalumnias pro la alkoholtrinkado, pruvante

Ĉu do la laboro de la abstinuloj ne estas pli malfacila ol la nia? Tamen ili laboras, laboras plenespere kun kredo, ke fine la homaro komprenos, ke « pecunia olet » (kaj alkoholulo odoras malbonege...), — ĉar ne povas esti indiferente, kiel la ŝtato akiras monon. Kaj tiam eble la ŝtatoj likvidos siajn potencajn propagando-aparatojn, kiuj ĉie kaj ĉiamaniere kriegas: Trinku, aĉetu kaj trinku alkoholon...

Jes, ili laboras. Ankaŭ dum la kongresa semajno ili laboregis.

Bonvolu imagi: homoj el 26 landoj,



INTER TOMBOJ DE PIONIROJ

Okaze de la abstinula kongreso en Varsovio s-ro Turnbull (meze), akompanata de nia korespondanto s-ro Gielb (dekstre), vizitis ankaŭ la tombojn de la fratoj de nia majstro, Leono kaj Felikso Zamenhof.

per statistikaj ciferoj, kiom da krimoj okazis pro alkoholo, kiom da mortoj kaŭzis alkoholo, kiom da hospitaloj kaj frenezulejoj pleniĝis pro alkoholo, kiom da stratakcidentoj estis faritaj pro ebriiĝo, kiom da familiaj mastrumadoj englutis kaj ruinigis alkoholo ktp. ktp. Terure eĉ nomi ĉiujn statistikajn rubrikojn de la diabla danco alkohola!

Tutar semajnon daŭris la kongreso, kiun partoprenis kelkcent personoj el 26 landoj. 120 diversajn referaĵojn oni legis, grandan internacian ekspozicion oni montris, ĉiamaniere konvinkante la publikon pri tiu freneza konduto de la homaro, kiu suferas pro alkoholo pli multe ol pro ftizo, tifo kaj multaj aliaj malsanoj kune!

Vere sizifa laboro.

Jen oni aŭskultis prelegon pri danĝero, terura veneno, stultiganta la homaron — kaj jen, elirinte en la Varsoviajn stratojn, oni rigardis en la montrofenestroj la belformajn botelojn kun la perligantaj trinkaĵoj, kiuj kvazaŭ invitas al glaseto...

oficialaj lingvoj la angla, franca, germana kaj pola. Nur malmultaj komprenas ian fremdan lingvon krom sia gepatra. Preskaŭ ĉiu vorto estis ripetita kvarfoje. Kunsido, kiu devus daŭri unu horon, daŭris 3-4 horojn, elĉerpante la ĉeestantojn neimageble. Tamen tiuj pioniroj laboras, kaj ilia signalvorto estas: nia estas la estonteco.

Jes, el tuta koro ni deziru al ili sukceson en la sobriĝo de la homaro kaj ni klopodu faciligi ilian laboron.

Ni konvinku ilin kaj pruvu, ke Esperanto 3-4oble faciligos iliajn penojn ĉe la internaciaj interrilatoj.

Al kelkaj abstinuloj, partoprenintaj en tiu kongreso, ni sukcesis pruvi la utilon de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Ĝi okazis jene: kiel speciala raportinto al Varsovia ĵurnalo mi ricevis inviton ĉeesti akcepton por la kongresanoj ĉe la prezidanto de Varsovio. Subite io ekbrilis en miaj okuloj: sur la brusto de iu ne-juna sinjoro mi rimarkis la verdan stelon.

Esperanto utilas

Al esperantistoj oni kompreneble ne plu bezonas prui ke Esperanto utilas. Sed tre taŭge estos, al la neesperantista publiko ĝin prui per artikoloj kiel tiu, kiu aperis en « Urednické Listy », organo de ĉeĥoslovaka privatoficista unuigo, sub titolo « Privata oficisto kaj Esperanto ». Verkis ĝin Pravoslav Bradáč, kaj la tradukon bonvole havigis al ni s-ano L. B. el L. Bělohrad. El la nomita artikolo ni ĉerpas la jenan alineon:

Mi konas unu junan entrepreneman viron, kiu eluzis la rilatojn kun fremdlandanoj kaj fondis (per Esperanto) malgrandan « internacian raportistan oficejon » (internacian gazetservon). Hodiaŭ post du jaroj li havas jam 60 kunlaborantojn (kompreneble senpagajn) eĉ en plej malproksimegaj mondpartoj, de kie li ricevas fotografajojn, artikoletojn, raportojn ktp. kaj ilin li aperigas en ĉitiea gazetaro. Li mem sendadas fremdlandan rekompence bildojn kaj artikolojn pri Ĉeĥoslovakujo kaj faras tiel bonegan kaj certe efikan propagandon por sia ŝtato. Krom tio, li ofte — helpe de siaj fremdlandaj kunlaborantoj — prilaboras ankaŭ aliajn aferojn (komercajn). Mi mem estas esperantisto jam de ok jaroj, kaj mi povas diri, ke de mia esperantistiĝo mi prizorgis al multaj fremdlandaj esperantistoj reprezentadon de niaj ĉeĥoslovakaj fabrikoj en iliaj landoj, kaj multaj el ili havas la reprezentadon de niaj entreprenoj jam tri jarojn. Mi havas multajn samlandajn esperantistojn, kiuj prenis eĉ nur okaze reprezentadon de fremdaj entreprenoj, gajnitan helpe de Esperanto, vizitis siajn konatojn, kaj ĉiam montriĝis iu gajno. Sed eĉ se la gajno ne estis tre granda, al multaj montriĝis tiel aliaj novaj vojoj por laboro kaj entreprenado, fortigis ilian memkonscion kaj alportis ĝojon pri sukceso.

UNUECO ESTAS FORTO

tial:

Varbu por I.E.L.

Tuj sekvis ĝoja interkompreniĝo kaj amikiĝo. La verdstelulo montriĝis s-ro instruisto John Turnbull, IEL-Delegito en Bristol (Anglujo). Ĉu ne ĝojiga surprizo por esperantisto?

Kaj en la postaj tagoj, kiam la samlandaj amikoj de s-ano Turnbull vidis kiom multe li scias pri ĉio en Varsovio, ili konfesis, ke Esperanto estas praktika kaj vere utila interkomprenilo.

Kaj kiam ili trarigardis la interesajn fotojn faritajn kun s-ro Turnbull dank'al Esperanto (kaj pere de Esperanto), ili envie ekinteresiĝis pri nia lingvo kaj movado.

Henriko Gielb.

Mallongaj Informoj

Raporto pri Esperanto en la Kongreso de la Internacia Federacio de l' teknika gazetaro.

Sekve de la Konferenco de Paris pri « Esperanto en la Moderna Vivo », la Internacia Scienca Asocio Esperantista prezentis al la Kongreso de la Internacia Federacio de l' teknika gazetaro, kunsidinta komence de septembro, raporton pri « Esperanto kaj la teknika gazetaro », kiu montris profiton riceveblan de la teknikaj revuoj per publikigado, kune kun ilia nacilingva eldono, de esperanta eldono, kies vasta disvendado ebligus, ke ili kontraŭstaru la malfacilaĵojn, kiujn al ili kaŭzas la sociaj ŝanĝoj antaŭvideblaj, kaj kies komencon kelkaj el ili jam malfacile subportas.

Konklude tiu raporto petis la Kongreson, ke ĝi invitu la ĉiulandajn teknikajn revuojn publikigi propagandajn artikolojn por Esperanto; tiu peto ne sukcesis, pro malaprobo de la germanaj kongresanoj, sed neniu teknika pravigo de tiu rifuzo estis sciigita.

Pro tio la esperantistaj teknikistoj proponu tiun konkludon al la teknikaj revuoj de sia fako.

« Nia Mondo »,

kultura aldono al « Esperanta Ligilo ».

Tiel titoligis granda blindula gazeto, kiu aperadas ĉiun duan monaton de post julio 1936. Ĝi estas eldonata de la « Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj » kaj enhavas artikolojn klerigajn kaj ĝeneralinformajn pri ĉio apartenanta al la kultura vivo. Ĝi ankaŭ enhavis ĝis nun unu landkarton en ĉiu numero, ekzemple en la lasta numero karton de Norda Ĉinujo. La kovrilo de ĉiu numero montras interesan kaj artan vinjeton en reliefo: la du hemisferojn kunligitajn per rubando, sur kiu estas la vorto « Esperanto », kaj super ili plene radiantan sunon.

Redaktoro de la gazeto estas vidanta samideano, s-ro Maurice Blake, Mount Road, Brendon, New Barnet, Anglujo. Li — kiel ankaŭ la eldonantoj kaj legantoj de la gazeto — estus treege dankema al tiuj helpemaj samideanoj, kiuj povas sendi gazetnumerojn, kiuj enhavas interesajn, klerigajn aŭ informantajn artikolojn, por represo. La amerikan « Scienca Gazeton » en Esperanto kaj « Heroldon de Esperanto » la redaktoro de « Nia Mondo » jam ricevas. Kompreneble, s-ro Blake estus ankaŭ senlime dankema al tiuj, kiuj eble povas traduki artikolojn por « Nia Mondo » en bona Esperanto.

Daŭriga kurso post Cseh-kurso

aperis dum tiu ĉi monato. Ĝin kompilis la konata Esperanto-pedagogino f-ino M. Saxl, kiu dum multaj jaroj instruis laŭ Cseh-metodo kaj gvidis preparajn kursojn por Cseh-metodaj ĝeinstruistoj en la internaciaj feriaj kursoj en Helsingör, Daniando. Oni ordinare spertas, ke la transiro de la amuza Cseh-kurso al la malpli amuza, sed cetala lernolibro daŭriga kurso seniluziigas multajn kursanojn, kiuj iom post iom forŝos el la daŭriga kurso. Tiun mankon nun forigis f-ino Saxl per sia nova kursmaterialo. Ĉar ne ekzistas daŭriga Cseh-kurso, sveda kaj dana Esperanto-institutoj kaj multaj ĝeamikoj de f-ino Saxl instigis ŝin ellabori kaj eldoni daŭrigan kurson post Cseh-kurso, en sama maniero kiel la materialo de la Cseh-kurso estas eldonita. Nun ĝi pretiĝis. Eldonas ĝin Dana Esperanto-Librejo, Thyrasvej 15, Aabyhøj, Daniando. Prezo (antaŭpage), inkluzive de sendkostoj, 8.25 kronoj. Mendebila ankaŭ ĉe la Libro-Servo de Heroldo, por 4.15 guldenoj.

Ĉiuj, kiuj konas la eminentan talenton kaj pedagogian lertecon de f-ino Saxl, ne dubas pri tio, ke ŝia daŭriga kurso post Cseh-kurso estas bonega, amuza kaj instrua, tiel ke la lernintoj per Cseh-kurso daŭrigos sian studadon same fervore kiel dum la Cseh-metoda kurso.

L. Friis.

Aktiva agado inter nederlandaj policanoj.

En la oktobra numero de « Monata Polica Bulteno », organo de Nederlanda Polica Esperanto-Unuiĝo, ni legas, ke tiu unuiĝo okazigas skriban kaj buŝajn Esperanto-kursojn por policistoj. La skriban kurson partoprenas 260 policistoj el ĉiuj partoj de la lando. En diversaj urboj la partoprenantoj ricevas buŝan klarigon al la lecionoj. Krome en Rotterdam okazas buŝa kurso por policistoj, kiun partoprenas 37 policistoj. Sekve entute preskaŭ 300 nederlandaj policistoj eklernas Esperanton!

Ne-nederlandaj policistoj esperantistaj, kiuj deziras partopreni kaj subteni la agadon por enkonduki Esperanton ĉe la polico kaj por restarigo de internacia policomovado peresperanto, estas petataj turni sin al s-ro J. Th. de Goeij, Luzacstraat 21a, Rotterdam, Nederlando. (Se eble aldonu respondkuponon; vi ricevos informilon kaj organon.)

Komercaj Esperanto-unuiĝoj en Romo kaj en Japanujo.

En Romo (adreso: Via Nazionale 208) fondiĝis « Esperanta Komerca Asocio » (EKA) kun celo disvastigi Esperanton kaj plifaciligi la internaciajn komercajn rilatojn. La asocio projektas ankaŭ la eldonadon de monata bulteno senpage dissendota al ĉiuj interesuloj. — Dum la venonta 25-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj (fine de novembro en Tokio) okazos fak-kunsido s.t. « Esperanto por ekonomia praktiko »; oni projektas fondi unuiĝon de japanaj komercistoj kaj industriistoj esperantistaj. (Adreso: F. K. Komitato, ĉe Japana Esperanto-Instituto, Montomaĉi, Hongo-ku, Tokio, Japanujo.)

Bulgara samideano bonsukcese prelegis en baltikaj landoj.

Bulgara publicisto Ivan H. Krestanov, malnova pioniro de nia lingvo, faris sukcesajn paroladojn kun lumbildoj pri « Bulgarujo, la lando de la rozoj kaj de la centjaruloj » en Kaunas, Riga, Liepaja, Tallinn, Pärnu, Narva, Tartu, Helsinki, Konvola, Viipuri, Savonlinna, Tampere, Uusikaupunki kaj Turku. La lokaj gazetoj favore raportis, publikigis intervjuojn kaj ofte ankaŭ la portreton de s-ro Krestanov. Multloke Saŭloj fariĝis Paŭloj. Esperanto ne estas vana vorto, ĝi mirinde servas. La tuta ĝisnuna vojaĝo de la bulgara lektoro okazis glate kvazaŭ sur reloj, dank' al modelaj programoj kaj planoj de litovaj, latvaj, estonaj kaj finnaj gesamideanoj, kaj dank' al la bulgaraj ĉefkonsuloj en Danzig, Königsberg, Riga, Tallinn kaj Helsinki. Nun s-ro Krestanov vizitas ankoraŭ Svedujon, Norvegujon, Danujon, Islandon ktp.

Per biciklo tra Eŭropo kun Esperanto.

Esperanto-instruanto O. T. Nicolaisen el Hammerfest, la plej norda urbo de la mondo, en Norvegujo, biciklis pasintan someron 6000 kilometrojn tra 12 landoj. Li biciklis ĉirkaŭ la Baltikon al la mondkongreso en Varsovio kaj poste tra Centra Eŭropo. Ankaŭ en somero 1936 li faris longan bicikladon tra Centra Eŭropo, kaj tiam ankaŭ vizitis la Arnhemman kurson. Ambaŭ bicikladoj sukcesis bonege, dank' al lia uzado de Esperanto, kaj ĉie li renkontis multajn samideanojn.

Desegnoj en la flava sablo anstataŭas internacian lingvon.

Germanaj ĵurnaloj raportas pri grandaj malfacilaĵoj en la interkompreniĝo de la germanaj Jungvolk-knaboj kun italaj kamaradoj kiujn ili vizitis. La ĵurnaloj skribas ke « oni provis... per desegnoj en la flava sablo, aŭ per la gestlingvo », kaj aldonas ke « okazis ankaŭ multaj komikaj intermiksoj ». Tiel oni mokas pri si mem, anstataŭ akcepti la sole prudentan solvon de la brulanta problemo: la jam bone funkciantan internacian helplingvon Esperanto.

El revo de pasintaj jarmiloj naskita por feliĉo de estontaj jarmiloj

En la samajna « Heroldo de Esperanto », n-ro 40/947 de 17.10.1937, troviĝas sub titolo « Defii la mondon! » energia refuto de falsaj kaj kalumniaj raportoj pri nia afero. El tiu refuto ni ĉerpas la jenajn alineojn, kiuj rilatas precipe al la sensenca aserto, ke Esperanto estas nur kreita por la judoj kaj por la atingoj de judaj celoj:

Nia ideo naskiĝis el la multmiljara revo de homoj ĉi u naciaj, ĉi u rasaj, kaj ĉi u klasaj; la internacia lingvo estas kreita por ĉi u j homoj de bonvolo en la tuta mondo, ĝi estas servonta al la tuta homaro. Kaj ni laboras kaj batalas ne por unu popolo, ne por unu raso, ne por unu klaso; ni laboras kaj batalas ne por iu religia sekto, ne por difinita politika partio; ni ankaŭ ne laboras kaj batalas por difinita templo. Se iuj politikuloj asertas, ke ilia laboro kaj batalo estas por jarcentoj, kaj povas ja esti ke ili pravvas, — tamen ni, mondlingvanoj, laboras kaj batalas por jarmiloj kaj jardekmiloj, por la tuta senlima estonteco de la homaro.

Ĝuste tiu fakto, ke nia laboro feliĉigos la tutan postni venontan homaron en ĉiuj ĝiaj generacioj senfinaj, ke ĝi postefikos ĝis niaj prapraaj nepoj, supezeble eĉ ĝis la lastlasta tago, — kaj ankaŭ la alia fakto, ke ni laboras ne por politika partiprogramo sed por la levo de la kulturo de l' tuta homgento ĝis hodiaŭ ne jam imag-ebla, plej supera apogeo, — ĝuste tiuj faktoj estas kio konsistigas la ne plu detruiblajn forton de nia ideo kaj de nia movado.

Tial al la adreso de ĉiuj niaj kaŝaj kaj malkaŝaj kontraŭuloj en la tuta mondo ni defie alvokas:

Se al vi plaĉas, ja starigu vin kontraŭ nia ideo kaj nia movado, furiozu kontraŭ ĝi, dissemu mensogojn kaj kalumniojn pri ĝi, malpermesu ĝin, persekutu, malliberigu, eĉ mortigu ĝiajn fervorajn propagandantojn, — vi atingos ĝuste la malon de tio kion vi intencas! Ĉar nia movado superis jam la mortigajn danĝerojn; ĝi jam pruvigis rezistokapabla al plej detruaj faktoj, al moko, insultoj, malpermesoj, persekutoj, milito, eĉ internaj malkapacoj; malgraŭ tio ĝi vivas, kaj ĝi vivos — eterne!

La Esperanto-Literaturo kreskas

Edward Bellamy: Rigardante malantaŭen en la jaro 2000. El la originalo tradukis C.M. Hamaker. — 182 p. 14x20 cm. Prezo guld. 1.50, bind. 2.—, plus sendkostoj, rekte de la eldonejo Gebr. E. & M. Cohen, Heerengracht 326, Amsterdam, Nederlando.

La mondo tordiĝas en spasmoj. La homgento ĝemegas sub ŝarĝoj kaj mankoj. Kaoso aŭ perforto regas ĉie. Frenezaj pretendoj, frenezaj leĝoj, subpremo kaj sufero. Kvazaŭ la homaro perdiĝis en senelirejo. Kiu montras la vojon al nova estonteco, al vera progreso, al reala feliĉo de la du miliardoj, kiuj loĝas la teron, kaj al la ceteraj miliardoj, kiuj povus senzorge vivi sur ĝi, se ĝi estus laŭplane organizita?

Aperis apostoloj — religiaj, sociaj, politikaj; ni ne dubu ilian sinceran bonvolon, sed la vojo elektita, aŭ la metodoj, ne taŭgas. Ofte ili kondukas la popolojn eĉ pli profunde en la mizeron.

Bellamy montras novan vojon: per forigo de la mono, per egala posedrajto por ĉiu, per egalaj devoj kaj rajtoj, variantaj nur laŭ la individuaj fizikaj kaj spiritaj kapabloj kaj inklinoj, kaj per plej intima kooperado de la tuta nacio.

Li vestas siajn viziojn kaj proponojn en ia formo de romano, — romano tute ne streĉa sed vere interesa. Kaj li pensis preskaŭ pri ĉio, kaj liaj eldiroj kaj proponoj ĝenerale estas bone fundamentitaj. Ekleginte kun multe da skeptiko, oni pli kaj pli aprobas la aŭtoron, kaj fininte la libron, oni ne povas ne konfesi, ke la homaro de la jaro 2000 vivas nepre pli senzorge, estas multoble pli bonstata, pli progresinta kaj, antaŭ ĉio, pli feliĉa ol ni bedaŭrinduloj, kiuj ne povos ĝisvivi tiun benriĉan epokon.

Iam io simila, eĉ se ne 100-procente tia, devos esti enkondukata, se entute la homaro ne volos perdiĝi en senfina senespereco. Sed kiam tio estos? En la nuna momento la vizioj de Bellamy ŝajnas nura fantazio. Utopio neniam realigebla. Sed kiu scias? Ni staras ĉe la komenco de nova ĉefepoko de l' monda kaj kultura historio.

Unu afero estas certa: Se la mondo estus organizita laŭ la ideoj de Bellamy, la tero preskaŭ estus paradizo, kaj la homaro preskaŭ atingus la staton de eterna feliĉo. Preskaŭ! Ĉar absoluta feliĉo ne ekzistas ĉi-sube, kaj eble eĉ ne estas dezirinda. Sed ĉiam restas strebinda la kiel plej plej senzorga ekzistado de la homa gento. Jam estus granda progreso, se la ŝtatoj de la mondo farus daŭrteman pacon, se la akuta militdanĝero estus forigita, se la limoj estus malfermitaj, se la popoloj povus libere interŝanĝi siajn bonojn materiajn kaj spiritajn, se ili povus internacie interkompreniĝi per unu helpa lingvo tutmonda komuna por ĉiuj... Ni strebu kaj strebu konstante.

La libro de Bellamy pentras al ni belajn perspektivojn. Oni povas nomi ĝin utopia; sed neniu legos ĝin sen profito. Tial mi povas ĝin varme rekomendi al la atento de l' gesamideanoj.

R-ano.

Biblia Studplano por helpo dum la kvietaj tempoj antaŭ Dio. Prilaborita el la angla lingvo kaj eldonita de Gustaf Bengtson kaj David Sandberg. Esperantigita de Martin Björklid. — 18 p. 11x14,5 cm. Prezo unu resp.-kup. ĉe Pastro David Sandberg, Uppsala, Svedujo. — Ĝi estas kalendareto kun temo pri religia medito por ĉiu tago de la jaro.

Hungarlanda Esperanto-Kongreso Ujpest 1937 estas la teksto de glumarko 6,5x6,5 cm, verda presita sur blua papero. Krome la marko montras la verdan stelon, blazonon kaj du pacbrancojn.

Ismael Gomes Braga: Veterano? 2.VI.1937. Eldono de « Gazeto de Ameriko », Rio de Janeiro. — 124 p. 13x19 cm. Prezo broŝ. 50 mil-rejsoj. Havebla por ned. guld. 0.80, inkl. sendkostoj, ĉe la Libro-Servo de Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; por l' s. 9 p. ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

La nelacigebla fervoro, neŝancelebla kredo en la finvenko kaj multjara sperto estas ĉe la aŭtoro same elstaraj kiel lia granda modesteco kaj lia junarda koro.

« Veterano mi?!... Eksigita soldato aŭ emerita oficiro?!... Sed mi estas juna kaj brava batalanto! » ekkrias li en la komenco de la libro. Tamen obeeme li respondas unu post alia la demandojn, kiujn la Varsovia LKK metis al 'a veteranoj de nia movado.

Sed nia brazila samideano faras tion en maniero tute propra, montrante al ni specon de historio pri brazila Esperanto-movado, kun kiu li — unu el plej agemaj ĝiaj pioniroj — estas forte kunligita.

Al la respondaro li aldonas kolekton de propraj artikoloj, preskaŭ ĉiuj brilantaj pro originalaj ideoj, — artikoloj el kaj ĉirkaŭ nia movado, kaj ne nur la brazila.

La lingvo estas tre bona; mi trovis nur du pekteojn kontraŭ la refleksivo kaj kelkajn preserarojn.

Papero fortika, preso klara, aranĝo plaĉa. Entute: eldonaĵo trege simpata, libro valora por ĉiu esperantisto, fonto de entuziasmo kaj de firma konvinkigo, el kiu plezure ĉerpos ĉiu samideano — veterano kaj novulo. T. J.

Franjo Modrijan: Elementoj latinaj en Esperanto. 46 p. 14x18,5 cm. Eldonis Esperanto-klubo, Ljubljana. Prezo din. 10.—. Havebla ĉe la Libro-Servo de « Heroldo de Esperanto », Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando, por guld. 0.50, inkl. sendkostoj.

Tre diligenta studaĵo, kiun ĉiu samideano, lerninta latine, kaj ankaŭ aliaj kun intereso kaj profito tralaboros.

En la finkonkludo la aŭtoro diras: « ... ne povas esti vero: ke Esperanto konsistas el pluraj lingvoj! Ni konfesu tion malkaŝe kaj diru sincere, ke Esperanto plejparte baziĝas sur elementoj latinaj! » La lastan aserton mi substrekas; sed kiu asertas, ke « Esperanto konsistas el pluraj lingvoj »? Fakte estas ke, kvankam ĝi plejparte baziĝas sur elementoj latinaj, Esperanto tamen enhavas elementojn ankaŭ el aliaj, do el pluraj lingvoj.

En la « Korektoj » okazis la malkorektigo « avantaĵo » de korekta « avantaĝon ». M.

Seppik-Malmgren: Sistemaĵo Esperanto Keele Kursus. — 4-a eldono. 111 p. 13x19,5 cm. Prezo 75 senti, ĉe la eldonejo F-a. Paul Tamverk'i Esperanto kirjastus, aapsalus, Estonio.

Francisko Rákóczi, la dua elektita hungara naciestro. Verkis Jozefo Mihalik de Hernádszurdok. — Unua kajero de serio « Pri Hungarlando por tutmonda Esperantistaro ». Eldonis la Hungara Esperanto-Federacio, Budapeŝto.

Doktoro Pierre Corret: Esperanto kaj stenografisto. Parolado farita de P. Flaguel en la Esperantista Grupo de Parizo. — 24 p. 13,5x21 cm. — Prezo 3 fr. fk. aŭ 2 resp.-kup. de la eldonejo: Stenografika Instituto Tutmonda, 9 Boul. Voltaire, Issy (Seine), Francujo. (Mendontoj de ĉi tiu broŝuro ricevos, kiel senpagan aldonon, lernolibron de Esp.-stenografio laŭ Du-ployé.)

Muusses Esperanto-Biblioteko. Ĉiu serio ampleksas 10 volumetojn de 32—36 paĝoj kun formato 13x20 cm. — Unuopa volumeto kostas 0,35 guld., tuta serio 2,50 guld. inkl. sendkostojn. — Eldonas J. Muusses, Purmerend (Nederlando). — Havebla ĉe la Libroservo de Heroldo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

(Recenzo pri vol. 1—7 vidu en « Esperanto Internacia », julio kaj septembro 1937.)

N-ro 8: Aleksandro Petöfi. La Avo. El la hungara originalo tradukis Ladislao Spierer.

La aŭtoro de ĉiu tiu novelo estas la plej fama hungara poeto, A. Petöfi, speciale konata per siaj poeziaĵoj. En ĉi tiu simpla senpretenda verkaĵo iu avo rakontas sian vivon — vivon de terkultura servisto unue, bienisto poste. Servutimile li dependis en sia juneco de despota mastro-filo, kiu pro ĵaluzo lin ĉikanis laŭeble. Esence la tuta rakonto temas pri amo en stilo de niaj praavoj: iom sentimentala, iom dolĉeta; mankas en ĝi io fajra, io energia. Tiaj homoj kun tiaj amoj sentiĝas nuntempe tro eterecaj.

Facila, ĉie uzebla legaĵo.

N-ro 9: La Junsaskito. Nekredebla historio de Ricardo Becerro de Bengoa. El la hispana originalo tradukis José Fernando Berenguer.

Tiu ĉi « nekredebla » historio certe plaĉos al tiu kaj tiu leganto. Ĝia ĉefideo estas tiel moderna kiel antikva: plilongigi la homan vivon aŭ, laŭeble, eternigi ĝin. Kiel la aŭtoro solvas la problemon, estas « nekredebla », sed interese.

N-ro 10: La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912 (La VIII a Kongreso en Kraków). Rememoraĵoj kaj Oficialaj Dokumentoj. Aranĝis kaj kompilis Julius Glück.

En la nuna jaro, kiam okazis la Ora Jubilea Kongreso en Varsovio, estas speciale aktuala ĉi tiu libreto kaj aparte interesa la komparo inter la du Jubileaj Festoj. La volumeto prezentas al ni rememoraĵojn kaj oficialajn dokumentojn alie malfacile haveblajn. La verkinto estis mem aktiva partopreninto kaj kunlaborinto.

La ĉefparton konsistigas la « cigna » kongresparolado de D-ro Zamenhof, unu el la plej koraj kaj animtuŝaj. Tiam li abdikis sian oficialan rolon de « Majstro », ne povante ne direkti adiaŭajn vortojn al sia anaro: « ... mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo!... Per unueco ni pli malpli frue certe venkos, ... per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj malamikoj kune. » Esperantistoj de l' nuntempo, ĉu vi aŭdis?

Jofebo.

La unua serio de MEB. estas kompleta. Laŭvice ĝi klopodis prezenti al ĉiu ion plaĉan aŭ taŭgan. Sekvu baldaŭ la dua serio kun aplikoj de la jam faritaj spertoj. Jfb.

Prof. Delfi Dalmau, LK: Ilustrita Lernolibro de Esperanto por praktika komenca Kurso. Eldonis la aŭtoro, Apartado 5081, Barcelono. — 16,5x24 cm. Prezo unu angla ŝilingo aŭ 1.50 pesetoj.

Tre taŭga lernolibro kun multaj bildoj inter la klariga teksto. La vorto « didakta » sur la kovrilo estas konvena al la verko, ĉar la enhavo estas aranĝita laŭ didakta maniero. W. B.

Internacia Foiro de Rio de Janeiro, 12.X. 1937 ĝis 15.XI.1937, eldonis ankaŭ nunjare novan, tre belan faldprospekton kun Esperanto-teksto, ilustrita per plano pri la foirejo kaj per 32 nigra- kaj unu multkoloraj bildoj pri la foiro, pri Rio kaj ĝia grandioza ĉirkaŭaĵo.

MONO EL LIGNO

En Columbia (Suda Karolino), Usono, ĉi festis dum 22-25a de marto pasintjara la 150-an datrevenon de la fondo de tiu urbo, kiel ĉefurbo de tiu ŝtato de Usono, per akto de la ŝtata parlamento en 1786. La Komisiono, kiu iniciatis la feston kaj aranĝis ĝian interesan programon, kolektis parton de la mono necesa por la elspezoj, eldonante lignajn


lignomono, kiun li aĉetis, povis ricevi ĝian valoron en usona mono, se li prezentis la monon al la Komisiono antaŭ aŭ je la dato nomita, kiel ankaŭ povis iu alia persono, kiu ne volis reteni ĝin.

La Komisiono efektive reaĉetis apenaŭ dek procentojn de la eldonita lignomono.



monbiletojn, kiujn oni nomis « Lignaj Nikeloj ». En Usono la monero, kiu valoras kvin cendojn, oni nomas ĉiam « Nikelo » tial ke ĝi estas fabrikita el tiu metalo. La lignaj monbiletoj montris valoron de unu, du aŭ kvin nikeloj laŭ diversaj koloroj, blua, verda aŭ ruĝa respektive. La butikistoj aĉetis ilin de la Komisiono je la nominala valoro kaj poste donis ilin al tiuj el siaj klientoj kiuj volonte akceptis ilin, kiel parton de ties

La anglaj vortoj sur la fronto de la blua ligna monbileto, kies klišo estas tie ĉi montrita, signifas: « 150a Datrevena Festo, Unu Ligna Nikelo ». La oficiala sigelo de la festo estas tie stampita. Tiu montras la malnovan kaj la nunan ŝtatomon, mapon de la ŝtato, kaj simbolean virinfiguron. Sur la malfronto oni vidas la sigelon de la urbo Columbia, tiun de la ŝtato Suda Karolino, kaj tekston en angla lingvo. La du kaj kvin lignaj



restmono. Tiuj klientoj povis aŭ reteni ilin kiel memorajojn de la festo aŭ elspezi ilin je la nominala valoro por aĉeti ĉe tiu aŭ alia butikio. Kompreneble la plejmulto da klientoj retenis la kuriozaĵojn kiel rememorigaĵojn de la festo. Per la lignaj monbiletoj la Komisiono enspezis proksimume 1200 dolarojn por la festo.

La lignaj nikeloj estas fabrikitaj el du maldikaj lamenoj de ligno, inter kiuj estas lameno de papero. Ili do estas tre flekseblaj, kvankam tute ne tiel fleksiblaj kiel ordinaraĵoj monbiletoj. Iu butikisto, kiu ne fordonis la tutan kvanton da

nikeloj malsimilas je la unu-nikelo nur laŭ la respektivaj koloroj, verda kaj ruĝa.

Ĉi tiun veran kuriozaĵon oni povas ankoraŭ nun ricevi, sendante al la Chamber of Commerce, P. O. Box 1405, Columbia, S. C., Usono, la egalvaloron. Kredeble la ideon iuj urboj eŭropaj povos uzi por enspezi monon por iaj siaj festoj. Kiel precipa favoraĵo al alilanduloj, la Columbia Chamber of Commerce sendos la kompletan: unu, du kaj kvin nikelojn, kontraŭ du respondkuponoj al ĉiu kiu mendas *esperantlingve*.

Vera Monumento de Paco

kiu troviĝas sur la teritorio de du landoj.

Esperanto-Gazetservo de Usono (s-ro Hugh Shatford) sendas al ni la ĵenan raporton pri tre interesa, vere internacia pacmonumento, laŭ Novjorka ĵurnalo « Times »:

La unua internacia pacmonumento de la mondo estas ĝardeno nun konstruata sur la Kanada landlimo proksime de Dunseith, Norda Dakoto (Usono), mezvoje inter la Atlantika kaj Pacifika Oceanoj. Konceptita en 1929 de Henry J. Moore, kanadano, la Pac-Ĝardeno okupas 2,200 akrojn, duono donita de ŝtato Manitobo (Kanado) kaj duono donita de ŝtato Norda Dakoto (Usono). Ĝi konsistas el arboj, montetoj kaj valoj, inter kiuj troviĝas 240 lagoj. La plej grandan parton de la surfaco oni konservas en ĝia natura stato, kun vojetoj, veturvojoj kaj rajdvojoj. Perdrikaj, tetroj, fazanoj, sovaĝaj anasoj kaj centoj da cervoj estas laŭleĝe protektataj. En aŭgusto la kantbirda loĝantaro superis laŭnombre tiun de iu alia simila areo en Usono. La tero sur la internacia landlimo, tamen, estos multe disvolvita, kun aleoj, herbejoj kaj florbedoj ĉirkaŭantaj monumentan fontanon en la centro de la Korto de Paco. Etendiĝante norden kaj suden de tiu Korto estos bulvaroj: « La Avenuo de la Provincoj », kaj « La Avenuo de la Ŝtatoj », ĉiu finiĝanta per memora flagstango, flirtanta en la koloroj de la du nacioj. Havante egalan spacon en Kanado kaj Usono, la fontana circolo estos, vere, ringo de amikeco.

Lago kun kvin specoj de akvo.

Rusaj sciencistoj esploris lagon, kiu el naturscienca vidpunkto estas tre stranga. Ĝi situas sur Kildininsulo apud Murman-bordo.

La lago havas kvin specojn de akvo, kiuj ne miksiĝas unu kun la alia, kiuj havas malsaman kemian ecaron, kaj tute malsamajn bestarojn.

La fundo de la lago estas nigra pro dikaj tavoloj de kalko, kaj la akvo plej proksima al la fundo estas saturita per sulfuraj haladzoj. Neniu vivaĵo povas ekzisti en tiu ĉi akvo. Super tiu ĉi tavolo estas alia kun ruĝuma akvo, kiu ricevas sian koloron de bakterioj, kiuj vivas en ĝi. Tiuj bakterioj senigas la akvon de la sulfuraj haladzoj. En la tria tavolo estas salhava akvo, en kiu eĉ marfiŝoj prosperas. Super tiu tavolo, kiu estas 3-4 metrojn alta, troviĝas tavolo da akvo kun malmulte da salo, kaj plej supre estas sensala akvo, en kiu fiŝoj kaj vegetaĵoj de dolĉakvo troviĝas. En la lago konstateblaj ankaŭ estas diversaj « kurentoj ».

Adil.

D-ro A. Sommer-Batek :

Projekto kiel ordigi la mondon per kulturaj fortoj

(Fino.)

Kio estas la minimuma vivkondiĉo?

La minimuma vivkondiĉo konsistas en minimuma manĝado, vestado, loĝado, kuracado kaj edukado, kiun oni havas nuntempe en la popolaj lernejoj. Tiu vivkondiĉo estus komence modesta kaj en la diversaj landoj diversa. Sed per teknikaj progresoj oni povus plibonigi kaj plivastigi tiun minimumon de la vivo. En la nordaj regionoj oni devus zorgi pri la varmo, en tropikaj regionoj kontraŭ ĝi. Tiu minimuma vivbezono ne estos aĉetebla, sed akirebla per minimumo de la laboro, kiun devos ĉiu plenumi por tiu ricevita vivkondiĉo. Estas kompreneble, ke la plenkreskuloj devos labori por la infanoj, junaj por la maljunaj, sanaj por la malsanaj. Se oni uzos teknikajn maŝinojn, oni povos fari multon per malmulta laboro. En pratempo oni certe ne povis akiri tian minimuman vivadon, kaj la tiamaj homoj havigis ĝin per ĉiama batalo kontraŭ sovaĝaj bestoj kaj kontraŭ la fortoj naturaj. Hodiaŭ, kiam la homo majstras tiajn fortojn, estas la minimuma vivo facile akirebla per la prudenta divido de la donacoj, kiujn liveras al ni la regado de la naturo.

La maŝinoj.

La maŝinoj, kiujn la homo elpensis, povus certe liberigi lin de peza laboro kaj penado, sed en niaj nunaj frenezaj tempoj ili senigas lin samtempe de laboro kaj de vivebleco. Kaj tamen la plej bonaj maŝinoj ne estas plene eluzataj pro tio, ke oni senvalorigus kun ili la kapitalon investitan pli frue en maŝinojn malpli bonajn. Ĉe la minimuma vivprovizo tio ŝanĝiĝus. Tiam oni preferus la plej bonajn maŝinojn, por ke la laboro por la minimuma vivado estu la malplej granda. Memkompreneble estas, ke oni devus enkalkuli en la minimuman proviz-laboron ankaŭ la fabrikadon de la necesaj maŝinoj. Sub tiuj kondiĉoj sufiĉus, ke oni laboru nur kelkajn jarojn, por ke estu fabrikita la ekvivalento de minimuma vivado por la tuta vivo. Sufiĉus, se oni liverus ĉiujare iun kvanton da homa kontingento, kiu devus prizorgi la minimuman vivadon dum la tempo de sia laborado ne nur por si mem, sed ankaŭ por ĉiuj, en tiu tempo ne okupitaj. Tiel estus eble, ke ĉiu homo akirus la rajton al ĉiutaga manĝado en komunumaj kuirejoj, al du vestoj kaj du subvestaĵoj dumjare, al unu ĉambro por si mem en la komunumaj domoj. La familio ricevus tiom da ejoj, kiom da membroj ili estus. Tio estus ĉio sen-

paga, sed neniun oni devigus akcepti ĝin kaj neniun povus ĝin disponigi al iu alia. La neuzitaj restus posedaĵo de la ŝtato, kiu per tio malgrandigus la labor-kontingenton necesan por la minimuma vivado. Oni povus tuj komenci, vokante ĉiujn senlaborulojn kaj donante al ili laboron anstataŭ la ne sufiĉan kaj humiligan monsubtenon.

La homoj sen timo.

La minimuma vivado forigus la timon inter la homoj, pro kiu oni hodiaŭ faras la plej terurajn krimojn. Mi scias, ke multaj asertas, ke la timo estas la sola rimedo, « teni la homojn en la mano ». Tion oni opiniis ankaŭ pri la edukado de infanoj, kaj tamen hodiaŭ oni konvinkiĝis, ke tio estas venkita vidpunkto. Ne pasis tre longa tempo, kiam oni torturis la homojn ĉe la juĝejo, kaj hodiaŭ ni abomene aŭskultas pri tiaj aferoj okazintaj ankoraŭ en Abisenio kaj Ĉinujo.

La humiligon pro la korpa puno oni sentas pli dolore ol la punon mem. Se en estonteco oni ne devigos la homojn al la laboro per timo antaŭ la puno, la homoj certe pli ĝoje laboros. La laboristo ne timos malakcepti la laboron mizere pagatan, kaj la laboradanto ne timos investi monon, ĉar ambaŭ estos sekurigitaj per la minimuma vivkondiĉo. La homoj tiam volonte laboros, ĉar la minimuma ekzistado ne kontentigos ilin. Ĉiu volas havi ankaŭ aliajn ĝuojn : tiu

— librojn, la alia — teatron, vojaĝon, fumadon, trinkadon, frandaĵojn, sporton ktp.

Kultura parlamento kiel aŭtoritato.

Kiel dependas de ĉi tio la kultura parlamento ? Tiu devas esti la aŭtoritato, por ke ĉiuj ĉi proponoj ne restu nur sopirata deziro. Ni bezonas tiun parlamenton konsistantan el eminentaj, bonkvalitaj homoj, kiuj povus efektiviĝi tiujn proponojn, aprobi ilin kaj subteni ilin per sia aŭtoritato.

Mia propono.

Tiun ĉi proponon mi sendas al ĉiuj homoj, pri kiuj mi pensas, ke ili povus aprobi ĝin aŭ per ilia kritiko plibonigi. Tial mi petas, ke ĉiuj, kiuj legis tiujn ĉi liniojn, skribu al mi sian opinion, pri kio ili konsentas, kaj pri kio ne, kaj kial, kaj kion ili proponus.

Mia propono devas fariĝi proprajo universala, ĉar ĝi helpus enkonduki kulturon kaj forigi la mizeron el la tuta mondo !

D-ro Alexandro Sommer-Batek,
Praha-Liboc 162, ĈSR.
Tradukis S. C.

*

Represo, tradukado, disvastigado tre petata ! Bonvole sendu aperaĵojn al D-ro Batek.

IELanoj, abonu vian oficialan semajnan organon !

De post la 1-a de oktobro 1936, la semajna HEROLDO DE ESPERANTO estas la aktuala oficiala organo de Internacia Esperanto-Ligo. Tiu gazeto grandformata ekzistas jam en sia 18-a jaro, kaj aperis de ĝi jam 950 numeroj. Kiu ankoraŭ ne konas ĝin, petu senpagan specimennon de la firmo:

HEROLDO DE ESPERANTO

Harstenhoekweg 223,
SCHEVENINGEN (Nederlando).

Aŭ, pli bone, aliĝu tuj al IEL por 1938 kiel MAH, aŭ mendu tuj minimume duonjaron abonon de supre citita adreso! Novaj abonantoj, kiuj tuj aliĝos al IEL kiel MAH por 1938, aŭ kiuj TUJ abonos la semajnan organon minimume por duonjaro (januaro-junio 1938) rekte ĉe la supre citita adreso, ricevos la ankoraŭ aperontajn numerojn ĝis 31 decembro 1937 tute senpage. Duonjara abono kostas egalvaloron de 3.40 ned. guldanoj.

ESPERANTISTOJ, SUBTENU VIAN SOLAN SEMAJNAN GAZETON !

Oni raportas

El Polujo:

La suno murdis homon. Kriminala enigmo.

En la pola policojurnalo « Napolterunku » de 1.8.37 aperis la jena artikolo:

« Unu el la polaj distriktaj juĝejoj refoje okupiĝis pri la iam fama proceso de murdo de s-ro B. S., pri kio estis akuzita riĉa bienulo P. La proceso, kiu daŭris 20 jarojn, prezentigas jene:

Al la germana civitano S., bienposedanto, venis s-ro P., konata kiel pola patrioto. Kiam s-ro P. forlasis la domon de S., oni trovis tiun lastan en sia ĉambro sen vivo. Li havis kapon trapafitan per mallonga pafilo, kiu restis kuŝanta sur la apuda skribotablo. Tuj oni suspektis s-ron P., kiu antaŭ tiu tempo havis proceson kontraŭ S. kaj laŭdire restis lia malamiko. La germana polico arestis s-ron P., kaj la juĝejo kondamnis lin al dumviva mallibereco.

Post reakiro de sendependeco de Polujo kaj post la anekto de Pomeranio al Polujo, s-ro P., pere de sia advokato, klopodis, ke oni reviziu la proceson, por ke li povi pruvi sian senkulpecon.

Sed la pruvoj pri la kulpo de s-ro P. estis tiom konvinkaj, ke la juĝejo ne esperis kontentigan rezulton de tiu revizio. Ja ĉiuj cirkonstancoj montris, ke la sola murdinto povas esti nur s-ro P.

Tamen la advokato de s-ro P. ne rezignis; post longaj eksperimentoj li venis al konkludo bazita je fizikaj reguloj kaj tiamaniere li sukcesis konvinki la juĝistojn pri absoluta senkulpeco de sia kliento.

Dum la nova trakto de la proceso la advokato deklaris, ke la murdinto de S. estas ne iu alia krom la... suno.

Laŭ la opinio de la defendanto, la morto de la bienposedanto S. estis kaŭzita per aŭtomato pafilo de la pafilo, kuŝanta apude sur la skribotablo. La pafilo, varmigiĝinta de fortaj sunradioj, ekpafis, kaj la kuglo trafis la kapon de la bienulo, dormanta apude sur kanapo.

Post tiuj argumentoj de la advokato, la juĝistoj decidis fari viziton sur la loko de la murdo.

Precize laŭ la dato de la okazintaĵo, en suna tago, oni faris la eksterordinaran eksperimenton: sur kanapo oni kuŝigis maneketon, imitantan la mortigiton, en sama pozo, en kia oni trovis lin post la murdo. Sur la skribotablon oni metis la saman pafilon, kiun bal-

daŭ komencis varmigadi sunradioj de la varmiga suno julia.

Post duhora denerviga atendado de la juĝistoj, subite la pafilo ekpafis kaj ĝia kuglo eniĝis tute en la mezon de la manekena frunto. »

Tio konvinkis la juĝistojn: ili tuj verdiktis senkulpigon de s-ro P., kiu preskaŭ 20 jarojn pasigis en malliberejo.

Tradukis Henriko Gielb.

El Hungarujo:

16-jara bienmastra geniulo en hungara farmo.

Sub fama geografo, Prof D-ro Karlo Kogutovicz en urbo Szeged, oni funde esploras la teritorion de la granda hungara ebenaĵo, kaj la komitato eĉ organizas model-farmojn. Oni esploras ankaŭ la ekonomian agadon kaj la popolnutradon. Pri la eduko de la malgrand-bienmastroj kun miro kaj ravo diris bonan opinion la vizitintaj anglaj kaj usonaj fakuloj. La tiel edukitaj mastroj atingas pli grandan rezulton sur 10-20 akreoj, ol mastroj kun 100 akreoj. Aparta mirindaĵo de tiu ĉi farm-teritorio ĉe Szeged estas 16-jara junulo, nomata Silvester Farkas, kiu estas geniulo en la mastrumado. Li havis nur ses klasojn de lernado, tamen li legas la plej malfacilajn fakverkojn kaj uzas ilian sperton en la praktiko. Li memstare mastrumadas kaj havas famon pro sia fakscio en florkulturado kaj abelbredado. En lasta tempo apud aliaj hungaraj urboj ankaŭ Szeged fariĝis konata pro sia unuaranga frukto-eksportado.

P. B.

El Svedujo:

La plej granda donaco iam farita de nuntempa svedo. La estro de Elektrolux sekvas la ekzemplon de Nobel.

S-ro Axel Wenner-Gren, estro de la bonkonata entrepreno Electrolux por polvsuĉiloj kaj malvarmŝrankoj, ĵus anoncis donacon, kiun oni priskribas kiel la plej grandan, kiun faris nuntempa svedo.

Kune kun sia edzino, devenanta el Kansas City en Missouri, s-ro Wenner-Gren starigis fondajon kaj transdonis al ĝi valorpapirojn, kiuj nun donas pli ol unu milionon da kronoj jare. Ĝi nomiĝos la Fondaĵo de Wenner-Gren, kaj ĝiaj celoj estas ampleksaj.

La celo de la fondaĵo estas labori por plibonigo de la stato de popolo kaj industrio en la nordaj landoj (Skandinavio

kaj Finnlando) kaj akceli pli bonan komprenon inter la klasoj per esploro en sociaj, ekonomiaj, sciencaj kaj medicinaj demandoj. La ĉefa deziro de la donacintoj estas, ke tiu esploralaboro kontribuu al pli intima kunlaboro kaj pli bona interkompreno inter la nordaj landoj.

Anoncante la starigon de la fondaĵo diris s-ro Wenner-Gren: « Nia scienca esplorado havas evidente antaŭ si senlimajn taskojn, kaj la fondaĵo devas, mi almenaŭ esperas tion, doni fruktoplenan subtenon aŭ evoluon en diversaj direktoj. En la nuna minaca situacio ŝajnas al ni plej urĝa afero, ke oni dediĉu ĝiajn rimedojn al tia agado, kiu akcelas unuecon en nia lando kaj en la landoj de la Nordo. » Li kredas, ke kunlaboro inter tiuj landoj povas esti nur favora por paco, kaj rimarkigas, ke Svedujo kaj Norvegujo ne havis militon de pli ol unu jarcento kaj Danujo ne post 1864.

Subtenon de la nova fondaĵo povas peti skandinavaĵoj kaj finnaj sciencistoj kaj aliaj, kiuj aktive laboras por akceli la komunan bonon de la Nordo, kaj en certaj kazoj ankaŭ eksterlandanoj rajtas tion fari.

Pasis nur ses monatoj, de kiam s-ro Wenner-Gren montris sian intereson por scienca esplorado per alia malavara donaco, kontribuante 400.000 kronojn por starigo de Stokholma Instituto por Eksperimenta Biologio.

Sved-Internacia Gazetservo.

El Usono:

Centjara jubileo de la "infanĝardeno".

Friedrich Froebel, ĉiel 55-jarulo, starigis la originan « Kindergarten » (infanĝardenon) en Blankenburg, Germanlando, en la jaro 1837. Oni opiniis lin « grizhara stultulo »; li konsilis malvarmajn banojn, kondukis siajn infanojn tra la arbaretoj senĉapele, recitante el verkoj de Goethe kaj Schiller. (Cetere, li ankaŭ ne vizitis diservojn, oni diras.) Dum 14 jaroj tolerinte tiun « danĝeran liberecon », la registaro fermigis ĉiun « infanĝardenon » kiu devenis de la Froebel'a. La fondinto mortis unu jaron poste.

Dumtempe en Usono s-ino C. Schurz, iama studentino de Froebel, interesigis la filantropinon Elizabeth Peabody el Boston pri la afero. En la jaro 1860 la Bostonanino malfermis la unuan usonan infanĝardenon. Dek jarojn poste ŝi vojaĝis al Germanlando kaj revenis kun Emma Marwedel, kiu starigis pedagogiejon en Washington. La movado kreskis kaj ricevis la aprobon de eminentaj usonaj edukistoj. Hodiaŭ ĉ. 600.000 kvarjaruloj kaj kvinjaruloj vizitas usonajn infanĝardenojn.

*Hugh Shatford,
laŭ « Readers' Digest ».*

La Impulso

Novelo de A. E. Cortinas.

De ioma tempo Tomáš Bartušek, la pentristo, pli ofte vidadis sian bofrat-inon Ruĵena. Du jarojn post la morto de lia frato, la juna sinjorino forloĝiĝis el la provinco al Praha, kie vivis ŝiaj gepatroj. La provinca medio ja ne ŝajnis al ŝi sufiĉe distra, kaj krom tio, kiam juna vidvino estas nur dudek naŭ-jara, ŝi ĝenerale atendas ke ŝi povu anstataŭi tion, kion la vivo forprenis al ŝi.

Ruĵena ne nur per beleco, sed ankaŭ per gracieco kaj vikleco ĉiam estis ĉarminta la pentriston, kvankam li ne vidigis tion, dum vivis lia frato. Nun, de kiam li vizitadis ŝin ĉe ŝiaj gepatroj, li preskaŭ ne kaŝis plu siajn sentojn. Kaj ankaŭ li vekis ŝian simpatian ĉiutage pli multe per sia revema vizaĝo, enkadrigita de malhelaj haroj, per sia sprita babilado. Jen oni vidis ilin en teatro, jen ili faris ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo, kaj ilia proksima fianĉiĝo estis konsiderata kiel fakto.

Tamen tio prokrastiĝis ankoraŭ ne-atendite. Neniu povis diri, kial.

lutage Tomáš renkontis sian kolegon Krátky en la strato.

— Nu, tiu demandis lin scivole, ĉu via afero sufiĉe progresis?

— Kiu afero?

— Rilate al via bofratino, sinjorino Bartušková.

— Ne. Daŭros eble iom da tempo.

Krátky fikse rigardis lin.

— Kiel do? Ĉiu parolas pri vi ambaŭ. Ĉu vi neas ke ŝi plaĉas al vi?

— Neniel. Sed mi ne voletas konfesi tion al ŝi. Nek per vortoj nek alie.

Krátky pli malfermis la okulojn.

— Kvankam vi scias ke ŝi atendas ĝin? Mia karulo, ĉu vi ne povas iniciati?

— Sendube; kiam la cirkonstancoj atingos la necesan evoluon. Sed mankas al mi — iu impulso.

— Impulso! Kion vi celas per tio?

— Animan funkcion, kiun ni ne povas doni al ni mem. Sed ĝi konsistigas la esencon de l' vera amo. Ĉu vi plenumos al mi modestan peton?

— Volonte.

— Diru al la familio de Ruĵena nek ion pri mia financa situacio nek pri miaj profesiaj sukcesoj; ankaŭ ne al ŝi! Enmemorigu: mi estas tre malriĉa artisto, kiu pene klopodas por vivi.

— Ŝi ĉesos interrilati kun vi, amiko!

— Tiam mi ne perdos ion... Ĝuste por tio mi ekzamenas ŝin. Mi volas esti amata pro mia persono, ne pro mia posedajo aŭ mia akiraĵo. Ĉu vi komprenas?

— Jes. Bone. Mi donas al vi mian promeson, sed mi esperas, ke la dezirata de vi impulso estiĝos plejeble baldaŭ.

La kolego enpenseme rigardis lin, antaŭ ol li foriris.

En la kvina etaĝo de iu domo en la strato Kamenická troviĝis la metiejo de Tomáš. Senpere apude estis ĉambreto, kiu enhavis nur mizeran liton kaj plian malimponan meblaron; Tomáš uzis ĝin preskaŭ neniam, ĉar lia efektiva ĉambro estis en la dua etaĝo, kie loĝis la dommastro.

Unufoje tagmeze, kiam la pentristo estis laboronta, oni sonorigis ĉe lia por-do. Aperis iu sinjorino, gvidante per la mano du ĉirkaŭ kvinjarajn knabinojn.

— Ĉu vi ankoraŭ konas min?, ŝi afable diris. Zdenka Černá, se mi bonvenas.

— Ha, jen! Fraŭlino Černá, kun kiu mi konatiĝis antaŭ kelka tempo dum vaporŝipa veturado sur la Elbo!

— Jes. Vi donis al mi vian adreson.

— Kia agrabla surprizo! Ni ja tiom bone interparolis.

Li invitis ŝin eniri. Ŝi ĉirkaŭrigardis iom scivole.

— Ĉi tie vi kreas viajn verkojn...; ŝi aldiris. Sed ĉu vi ankaŭ sukcesas, sinjoro Bartušek?

Tomáš rezigne movis manon.

— Kion faru malriĉa artisto sen interrilatoj kaj protekto? li mensogis. Tamen, ne estas grave. La arto tiom pli riĉigas nin. Per ĝi barako fariĝas templo.

Li retiris la kurtenon kiu pendis antaŭ la apuda ĉambro, por preni pecon da kuko el la tiea ŝranko kaj prezenti ĝin al la infanoj. Dume Zdenka Černá ekvidis la mizeregan ĉambron kaj ŝiaj lipoj ĝemis kompateme. Tiam ŝi ekparolis rapide pri la celo de sia vizito:

— Mi transdonas al vi per tio komision. Tiuj ĉi infanoj estas la dunaskitinoj de mia frato, profesoro Slíva.

— La arthistoriisto?, Tomáš interrompis ŝin.

— Jes. La edzino forvojaĝis, havos naskiĝotagon post sia reveno, kaj pro tio li intencas pentrigi la du infanojn por donaci al ŝi la portreton. Mi rekomendis vin al mia frato, montrante al li la malgrandajn kopiojn de viaj pentraĵoj, kiujn mi ricevis tiam. Ili konvinkis lin pri via talento. Nun vi povas tuj komenci la plenumon.

Tomáš riverencis dankante. Ili aranĝis la detalojn; la infanoj estis alkondukotaj por modelsidado dum tagmezo. Tio estis la sola tempo, dum kiu Zdenka Černá kiel bibliotekistino de l' universitato estis libera.

La bildo rapide estis finita, entuziasmige la profesoron kaj enspezigis al Tomáš sufiĉe da mono. Sekve de tiu ĉi okazo liaj amikaj interrilatoj kun la bonanima Zdenka Černá, kiu senĉese cerbumis pri ebleco plibonigi lian profesion situacion, daŭris. Ankaŭ kun ŝi li faris ekskursojn, vizitis la teatron kaj ob-

servis, ke ŝi admiras la naturon multe pli sincere, ke ŝia sentimento eniĝas la arton pli profunde ol lia bofratino Ruĵena. Li sentis sin feliĉa en ŝia societo; tamen li ne emis malkaŝi tion al ŝi. Mankis iu impulso...

Iom post iom lia rezervo senpacien- ĝis Ruĵena'n. Ŝi deziris esti pentrata de li kaj esperis ke ĉi-okaze malaperos lia enigma obstino. Iudimanĉe ŝi subite eniris lian metiejon. En sia eleganta vestaro la juna vidvino strange kontrastis kun la malriĉa loĝejo de la pentristo.

— Ha, Tomáš, ŝi ekkriis, vi frotas viajn okulojn? Vi certe ne supozis ke mi venos? Diru, — dum tio ŝi kritike ĉirkaŭrigardis — ĉu viaj financoj ne permesas al vi lui pli bonan metiejon?

Ne atendante lian respondon, ŝi retiris la kurtenon je la flanko...

— Tio do estas via dormoĉambro?, ŝi aldonis sulkigante la nazon.

(Finota.)

Se ĝi ne estas vera...

Itala proverbo diras: « Se ĝi ne estas vera, ĝi estas bone eltrovita » — per tio oni celas interesajn anekdotojn, kiel ĉi tiujn (se la leganto ilin opinias tiajn):

Pli nobela.

Don Alfonso supreniras fiere la ŝtupojn de sia reĝa palaco, dum lia filo same fiere lin antaŭiras. Subite la reĝo haltigas sian idon, dirante: « Ĉu do Ci ne scias, filo mia, ke mi estas la tre nobela Don Alfonso kaj ke neniu rajtas iri antaŭ mi, tial ke neniu estas pli nobela ol mi? » — Respondis la filo: « Ci eraras, tre nobela patro; mi rajtas iri antaŭ Ci, ĉar mi estas ankoraŭ pli nobela ol Ci. Ci havas dek-ses prapatrojn, sed mi havas dek-sep! » — Tiam la reĝo kliniĝis antaŭ sia filo kaj diris: « Ci estas prava; Ci estas ankoraŭ pli nobela ol mi ». Kaj de tiu tempo la nobela filo iris antaŭ la nobela Don Alfonso..

La kuracisto de Bismarck.

Jen kiamaniere la fama doktoro Schweninger fariĝis la preferata kuracisto de sinjoro von Bismarck. La kanceliero foje suferis trege pro podagro; neniu kuracisto povis lin resanigi, kaj tiam oni venigis la bavaran doktoron Schweninger. Ĉi tiu longe pridemandis la pacienton pri ĉio, kio koncernis lian antaŭan vivadon; sed fine s-ro von Bismarck, kiun tia demandado tedis, petis la doktoron silenti. — « Nu do », diris la kuracisto, « vi devus venigi iun veterinaron; tiu ne bezonas pridemandi siajn klientojn. » — S-ro von Bismarck komence stultiĝis pro tia malĝentila, kruda respondo; sed poste li ridis kaj konservis la kleran bavaron por sia servo. Doktoro Schweninger efektive estis la sola viro, kiu kapablis superregi la germanan « feran » kancelieron.

Li sciis sin helpi.

La fama desegnisto Gustave Doré foje troviĝis en Verona kun iu amiko, kiu volis fotografi kelkajn pitoreskajn stratojn de la urbo. Tiam kolektiĝis, kiel kutime, ĉirkaŭ la aparato multe da videmuloj, kiuj Doré vane penis forigi. Ju pli li gestis kaj kriis, des pli densa afariĝis la popolamaso. Fine li havis bonan ideon: preninte sian ĉapon en la manon, li komencis kun lamenta mieno peti almozon inter la popolo. La efiko estis miriga: post unu momento ĉiuj rigardantoj estis for, kaj la amiko povis senĝene preni sian negativon.

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Naskiĝo. Fileto Georgo naskiĝis ĉe komerc-lerneja profesoro Roberto Wagner, del. de IEL en **Budapest-Obuda, Hungarujo.** Plej korean gratulon!

Fianĉiĝo. Susanne Jansson, filino de rektoro Sam Jansson, **Stockholm,** akceptis ringon de Karlhugo Brunsog, nun en **Paris.** — Ni kore gratulas.

Edziĝo. La 24.7.1937 edziĝis la prezidanto de Esperanto-societo kaj delegito de IEL en **Panevezys,** Litovujo, s-ro J. Kanas, kun samideanino R. Dvarionaite el Riga, Latvio. La Esperanto-societo korege gratulas la geedzojn, kaj ankaŭ nia redakcio deziras ĉion bonan por la estonteco.

Ora Edziĝa Jubileo. Tiun maloftan feston povis soleni la 10.9.1937 ges-roj Robertson en **Wood Green, London.** S-ro Robert Robertson estas unu el la plej konataj britaj esperantistoj, kaj eksprezidanto de Brita Esp. Asocio. — Plej korajn gratulojn!

Harald Thilander 60-jara. Harald Thilander, **Stocksund, Svedujo,** la energia pioniro de la blindula Esperanto-movado kaj eldonanto de « Esperanta Ligilo », fariĝis la 25-an de oktobro 60-jara. Nian plej koran gratulon!

Ekspoziciaĵojn (gazetojn, gvidlibrojn, reklam-aĵojn ktp.) petas Odsted Esperanto-klubo. **Letervesperon** ni aranĝos meze de novembro. Pruvu, ke esperantistoj troviĝas ĉie! Respondo garantiata. Adreso: Herluf Nielsen, **Rugsted ĉe Vejle, Danlando.**

Danko. S-ro C. Ashmore Baker kore dankas delegiton en **Nottingham, Anglujo,** s-ron H. O. Schofield, pro delikata kaj persona enketado afable farita de li.

Dr. Stan. Kamaryt, IEL-delegito en **Bratislava, Ĉeĥoslovakio,** petas ĉiujn siajn korespondantojn kaj liverantojn adresi la sendaĵojn laŭ lia nova adreso: Prayova 28.

Novan adreson bonvolu noti: F-ino E. Buchty, Heinrichsallee 9, **Aachen, Germanlando.** Saluton al ĉiuj geamikoj!

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi kun ĉiuj landoj. Richard Ressel, **Rückersdorf No. 191,** distrikto Friedland i. B., Ĉeĥoslovakio.

La gelnantoj de la Komerclernejo en Amersfoort, Nederlando

deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun la tuta mondo. Post ricevo ili resendos poŝtkarton kaj adresliston.

Esperanto oficiale instruata!

Mi interŝanĝos 150 ĉeĥoslovakajn poŝtmarkojn por eksterlandaj. Afranku filatelie! Mi deziras daŭrajn rilatojn por ĉiujara interŝanĝado de poŝtmarkoj. Jan Trsek, **Praha XIII-Zborov, Vykánská 729, Ĉeĥoslovakio.**

Interesigu cent mil personojn!

Ĉe la Komitato de **Eŭkarista Kongreso 1938 en Budapest** oni starigas oficialan Esperanto-fakon. Via devo: helpi, ke multaj eksterlandanoj vizitontaj la Kongreson lernu Esperanton ĝis majo 1938! Malofta okazo, ĉar venos pli ol 200.000 fremduloj! Do proponu al lokaj katolikaj societoj, ke la vojaĝantoj lernu Esperanton, por kiu celo estos gvidantoj, interpretistoj. (Por aliaj lingvoj eble ne estos sufiĉaj!) Do, unika okazo! Demandojn adresu al la kongresa komitato, **Budapest IV, Ferenciek-tere 7, Hungarujo.** Ĉiuj Esperanto-societoj, grupoj kaj delegitoj eklaboru! Petu multnombre Esperantajn prospektojn, afiŝojn, informojn! Petu por montri lumbildojn pri Budapeŝt; ilia prezento interesos la kongresantojn.

Nun komenciĝas aŭtuna laboro ĉe skoltoj. Interesigu ilin pri Esperanto. Invitu ilin al lumbildparolado en nacia lingvo pri ĵamboreo en Gödöllő (la serio de 60 bildoj kun teksto, kiu propagandas Esperanton, kostas 1.30 dol. ĉe Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Nagy Sándor-u. 6, **Budapest V, Hungarujo.**) En 1939 estos rovera mondtendaro. Jam nun instigu la partoprenantojn por lerni Esperanton! (443)

Volonte mi korespondus kun katolikaj gefratoj, kiuj partoprenos la XXXIV-an Eŭkaristian Kongreson, precipe kun aŭstrianoj el Graz. Ĉiu letero respondota. Ily Mátéffy, Kerepesi ut 31, **Budapest X, Hungarujo.**

Mi interŝanĝas «Block»-ojn kontraŭ «Block»-oj, laŭ Yvert, Michel aŭ Froede. Sendu rekomendite! Respondo garantiata. S-ro Louis Festrats, Pastoor Van de Wouwerstraat 24, **Berchem (Antwerpen), Belgujo.**

Mi deziras korespondi kun ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtmarkojn. Adreso: S-ro Danlou Albert, 13bis, rue Thiers, **St. Quentin (Aisne), Francujo.**

Interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo Ant. Kučera, **Trnovany-Teplice Ĉeĥoslovakio.**

Ĉiam valida anonco. Deziras interŝanĝi eŭropajn poŝtmarkojn laŭ Yvert, preferas neuzitajn. Antaŭa interkonsento necesa. Ne sendas unue, respondas ĉiam en 8 tagoj. — H. Zyka, Hlav. pošta, schr. 373, **Praha, Ĉeĥoslovakio.**

Poŝtmarkojn interŝanĝas, kvanton kontraŭ kvanto, aŭ laŭ katalogo (prefere: Michel 1938) s-ro A. Hvorslev, Del. IEL, Asylvej 1, **Risskov, Danlando.**

Mi akceptas ĉiujn sendifektajn memor-, bonfar-kaj aer-poŝtmarkojn. Ne sendas unue, sed estas nepre honesta kaj kompensas laŭ via aldonata mankolistoj. (Bazo: Yvert.) S-ro Karl Johansson, Döbelnsgatan 71, 3 tr. v., **Stockholm, Svedujo.**

S-ro M. de Puydt, Rue Van Schoonbeke, 148, Anvers, Belgujo, deziras ricevi bonajn poŝtmarkojn de seriozaj kolektantoj. Rekompenso li sendos belajn belajn poŝtmarkojn de sama valoro. Sendu rekomendite! Respondo garantata.

Por unu respondkupono vi ricevos: aŭ broŝuron « Pri la prononcado de Esperanto », aŭ originalan unuaktaĵon « La svatanto », aŭ « Marionetaj ludoj », unusola tiaspeca Esperanta originalaĵo. Sendu al: Krystallo, **Ĉ. Těšín, Saskákupa, Ĉeĥoslovakujo.**

Du svedaj junuloj deziras korespondi. Skribu al s-ro Olle Persson, Saritslöv, **Skurup,** aŭ s-ro Harry Ivarsson, Box 82, **Skurup, Svedujo.**

Ĉiulingvajn librojn, broŝurojn, gazetojn, kaj revuojn kun artikoloj de kaj pri la ĉeĥoslovaka ŝtatprezidinto **T. G. Masaryk** bonvolu sendi kontraŭ rekompenso al s-ro Dolfa Bartošik, Esperanto-instruisto, **Otrokvice-Batov, Ĉeĥoslovakio.** La celo: propagandi Esperanton en medioj kontraŭesperantaj. Sukceso treege helpos min! (444)

Interŝanĝon de leteroj pri diversaj temoj kaj poŝtkartoj kun la tuta mondo deziras Georg Olsson kaj Einar Karlsson, **Östafors, Svedlando.**

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj. S-ro Otto Wäppling, Box 42, **Lakaträsk, Svedujo.**

Poŝtmarkojn interŝanĝas kun seriozaj filatelistoj. Por 500-5000 ĉiam sendos saman kvanton aŭ samvalorajn laŭ Michel. Z. Székely, **Pestszentlőrincz, Kossuth u. 198 b, Hungarujo.** (Delegito de IEL.) (440)

Poŝtmarkojn interŝanĝas kun ĉiuj landoj Bahrih Hans, Poŝtfako 25, **Zemun, Jugoslavio.**

Ismael Gomes Braga



2-VI-1937

FRONT DE
"GAZETO DE AMERICO"
Rio de Janeiro

124-paĝa, klare presita, plaĉe aranĝita. Tre simpatia eldonajo, libro valora por ĉiu esperantisto, fonto de entuziasmo kaj de firma konvinkigo, el kiu plezure ĉerpos ĉiu samideano — veterano kaj novulo.

Prezo: broŝurite:

5 milr., ĉe Livraria Editora de Federação Esperantista Brasileira, Av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo;

0.80 ned. guld (inkl. sendkostoj) ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando;

1 ŝ. 9 p. ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

(447)

KORESPONDA CENTRA INTERNACIA AMSTERDAM

2e Helmersstraat 22 (Nederlando)

havigas ĉiuspecajn korespond-adresojn, ebligas korespondadon kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, en ĉiuj lingvoj, organizas ŝak-, briĝ- kaj damkonkursojn, havas specialan filatelan merkaton.

Petu detalajn informojn!

Ni serĉas ankoraŭ reprezentantojn en diversaj landoj tra la tuta mondo. (445E)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.